

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №2



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №2 (316)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2023

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (2500 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1500 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (750 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (500 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2023, №2 (316).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 30 июня 2023 г.

| | |
|---|-----------|
| Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i> | 2 |
| En ĉi tiu numero | 3 |
| Eventoj | 5 |
| Ulrich Brandenburg. Braunschweig: La centa Germana Esperanto-Kongreso | 6 |
| Ladislav Kovář. La 74a IFEF-kongreso | 9 |
| Tim Owen. La 103a Brita Kongreso: Senduba sukceso | 11 |
| Renato Corsetti. Esperanto en grava kunveno de gvidantoj de UN | 16 |
| La gajnintoj de la konkurso Partoprenu IJK-n 2023 | 17 |
| Ralf Haumer, Stefan Krieghoff. La 39a PSI okazis denove reale | 18 |
| IJF: Junularaj asocioj revigliĝas | 19 |
| Povilas Jegorovas. Ĵurnalista seminario: tradicia tempo, nova loko | 21 |
| Marijus Dilba. Boatado-2023: Tra Litoviaj lagoj kaj riveretoj | 22 |
| Paulo S. Viana. Revigliĝo en la Paraíba-Valo | 24 |
| Leandro Abrahão. Spiritistoj survoje al internacia asocio | 25 |
| Irina Gončarova. Temploj kaj Urboj en Tula. Privataj impresoj | 26 |
| Irina Gončarova. Cent semoj perdiĝas, sed la cent-unua ekĝermas | 28 |
| Liba Gabalda. PEKO: Printempa Esperanto-Kunveno | 30 |
| Ineke Emmelkamp. Studosemajnfinoj en Nederlando | 32 |
| Ronald Schindler. Ponta Festo en Frankfurteto | 33 |
| Tiina Oittinen. Somera kurso 2023 en Finnlando | 34 |
| Parker Glynn-Adey. Mez-Kanada renkontiĝo | 35 |
| Mireille Grosjean. Kultura semajnfino de Svisa Esperanto-Societo | 36 |
| Xie Ruifeng. Omaĝe al la centa naskiĝdatreveno de Laŭlum | 37 |
| Zhao Dezhi. Omaĝe al Verda Majo | 38 |
| Gražina Opuskienė. Zamenhof-ekspozicio en Mažeikiai malfermita | 38 |
| Ilona Koutny. Postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj rete | 39 |
| Dujaraj magistras studoj pri interlingvistiko en Poznano | 39 |
| Aleksander Korĵenkov. UK-108: 1139 aliĝintoj el 65 landoj | 40 |
| Bert Schumann. Dekjariĝo de Printempas kun KER-ekzamenoj | 41 |
| Aliĝu al KER-ekzamenoj en Torino kaj prepariĝu por ili | 42 |
| La 9a Nitobe-simpozio en Torino | 43 |
| IJK 2024 okazos en Litovio | 45 |
| La 40a Pola Esperanto-Kongreso | 46 |
| Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Giuseppe Grattapaglia forpasis | 46 |
| Tribuno | 47 |
| Deklaro de la Akademio de Esperanto pri la Esperanta litero ŭ | 48 |
| Renato Corsetti, François Lo Jacomo, Humphrey Tonkin. La nacia festo de esperantistoj: La 26a de julio ĉiujare | 49 |
| Nur du seksoj en Esperantio | 50 |
| Lu Wunsch-Rolshofen. Tio ne sonas kiel katastrofo | 51 |

| | |
|---|------------|
| Aleksander Korĵenkov. Pri libroj kaj broŝuroj | 52 |
| Programo “Ni semas” de la Afrika Komisiono | 53 |
| Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Familioj | 54 |
| Mesaĝo de UEA al UN okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, la 20an de junio 2023 .. | 55 |
| Arkivo | 56 |
| Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en julio 2023 | 57 |
| Aleksander Korĵenkov. Kiom da poŝtistoj en Sovetunio sciis Esperanton? | 58 |
| La tria letero de N. Ĥoĥlov al J. Baghy | 59 |
| Aleksander Korĵenkov. Antaŭ 45 jaroj: Esperantista tendaro en Altaĵa stepo | 67 |
| Kulturo | 69 |
| Aleksander Korĵenkov. Konkize pri Ivan Ŝmeljov | 70 |
| Ivan Ŝmeljov. La feb-ro. La oveto. La mirakla bileto. La eterna lumo. La agrabla promeno (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova, Vladimir Vyĉegĵanin) | 71 |
| Paulo Sérgio Viana. Emeritiĝo | 112 |
| Miguel Fernández. Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (1) | 115 |
| Carlo Minnaja. <i>Kandido</i> : Dokta solvo de pluraj krizaj punktoj (Recenzo: Voltero. <i>Kandido, aŭ Optimismo</i>) | 123 |
| Stanislav Belov. <i>Gardantoj de lingvo</i> : Libro instrua, kleriga, pensiga (Recenzo: Florian Coulmas. <i>Gardantoj de lingvo. Dudek voĉoj tra la historio</i>) | 126 |
| Wolfgang Kirschstein. Orfeo kantas (Recenzo: Rainer Maria Rilke. <i>La Sonetoj al Orfeo</i>) .. 129 | |
| Paŭlo Moĵajjevo. Albumo kun agrabla “hejmeca” sono, sed iom simplaj tekstoj (Recenzo: ĴeLe. <i>Tra la sonĝoj</i>) | 131 |
| Floréal Martorell. <i>En Esperantujo</i> : La tria bitalbumo de ĴeLe | 132 |
| Floréal Martorell. <i>Vestiĝoj</i> : Nova bitalbumo de Martin & la talpoj | 133 |
| Floréal Martorell. La debuta bitalbumo de Klarisa | 134 |
| Paulo Sérgio Viana. Rusa Novelaro 2: Vera regalo | 136 |
| Povilas Jegorovas. La Granda Esperanta-Litova vortaro aperis | 137 |
| <i>Literatura Foiro</i> , 2023, N°322 | 139 |
| <i>Literatura Foiro</i> , 2023, N°323 | 139 |
| Aleksander Korĵenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> : Matematiko kvantas | 141 |
| Mozaiko | 142 |
| Stanislav Belov. La feria sezono! | 143 |
| István Ertl. Spretaj splitoj kaj preskeraroj | 144 |
| Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i> | 145 |

Kovropaĝe: La germana pentristo Hermann Seeger (1857-1945) ofte surtologis siajn filinojn Hildegard kaj Ilse, kiuj volonte pozis por sia patro, ekzemple, en sablaj dunoj de la Balta Maro.

Eventoj



La primovada rubriko “Eventoj” ĉi-foje estas la plej ampleksa dum la tri lastaj jaroj, ĉar neniu el la esperantistaj kongresoj kaj renkontiĝoj, anoncigitaj por aprilo-junio 2023, estis nuligita pro la pandemio aŭ militaj agoj. Tio promesas denove buntan kaj abundan Kongresan Sezonon el Esperantujo.

La supra foto de Stefan Krieghoff montras parton de la partoprenantaro de la jubilea GEK en Braunschweig, kiu allogis pli ol ducent personojn.

Braunschweig: La centa Germana Esperanto-Kongreso

La Esperanto-vivo en Germanio komencis organiziĝi jam relative frue: la klubo en Nürnberg (antaŭe volapükistoj) adoptis Esperanton jam en 1888, unu jaron post la apero de la “unua libro”. Sed la fondiĝo de tutlanda asocio daŭris ĝis la jaro 1906, kaj sian hodiaŭan nomon la Germana Esperanto-Asocio ricevis nur en 1909. De la fondiĝo en Braunschweig ĝis hodiaŭ pasis 117 jaroj, kaj tamen la 26-29an de majo 2023 okazis “nur” nia 100a kongreso. Pri la mankantaj jaroj kulpas la du mondmilitoj kaj la malpermeso de ĉia Esperanto-agado dum la nazia periodo.

Kiel la naskiĝurbo, Braunschweig konservis apartan rolon por la germana Esperanto-movado. Tie okazis ankaŭ la 50a GEK, la centa datreveno de la asocio en 2006, kaj nun do la jubilea kongreso. Jubileoj estas okazoj por festi, en ideala kazo ankaŭ por lerni el la historio kaj por fari planojn. Estis bona kongreso, kaj mi revenis el Braunschweig iom pli optimisma ol antaŭe.

Inkluzive la paralelan junularan renkontiĝon, partoprenis en la kongreso pli ol 200 esperantistoj el 13 landoj, inter ili UEA-prezidanto Duncan Charters kaj vicprezidanto Amri Wandel. Por la inaŭgura kunsido ni gastis en la festsalono de la antikva urbodomo: digna kadro, kiun ni eĉ sukcesis plenigi. Aliaj programeroj okazis en la salonoj de la junulargastejo (ĝin komplete okupis la kongresanoj) kaj en proksima salono de la ĉefa loka gazeto.

Post la inaŭguro kun salutvortoj de la urbo kaj UEA la enkondukaj prelegoj pritraktis la asocian historion kaj unu tre gravan aktualan aspekton de Esperanto. Pascal Dubourg Glatigny parolis pri la reapero de esperantistoj en Germanio (el kiuj pluraj aktivis en la rezisto kontraŭ la nazia reĝimo) post 1945, kaj Ilona Koutny pritraktis interkulturan komunikadon en Esperanto. La sukceson de ŝia instruprogramo en Poznań ilustris ne laste grupeto de ĉinaj gestudentoj, kiuj partoprenis en la junulara parto de la kongreso.

Necesus ĉi tie nun listigi ĉiujn aliajn programerojn de la 100a GEK, sed mi ne povus mem raporti pri ĉiuj. La kongreso – inkluzive ĝian plilongigan parton, kiun GEA unuafoje organizis kaj por kiu restis ĉirkaŭ 60 kongresanoj – daŭris tutan semajnon. Sed multegaj eventoj okazis paralele, kaj mi aŭdis iom da bedaŭro, ke ne eblis sekvi ĉiujn. Ĉiu tamen povis ĉeesti la du festvesperojn: sabate kun koncerto de la kantistino Kjara el Italio, kaj dimanĉe kun prezento de loka dancgrupo (gajninto de pluraj naciaj konkursoj) kaj koncerto de Kimo + Radio Mondo. Bonŝance la loko sufiĉis ankaŭ por dancigi la kongresanojn, el kiuj multaj restis longe post la noktomezo. Dum la postaj tagoj en iom pli malgranda rondo koncertis kaj kabaredis Georgo Handzlik kaj Saša Pilipović, ambaŭ bone konataj en Esperantujo.

Kompare al pasintaj kongresoj ege abunda estis la ekskursiva programo: kvar gvidadoj tra la historia urbocentro, ekskursoj (ankaŭ biciklaj kaj boataj) al aliaj





La ĉeestantaj membroj de la nova GEA-estraro en Braunschweig (Foto: Matthias Hecking)

vidindaĵoj en la urbo, partopreno en urba festo de la Esperanto-urbo Herzberg dum la kongresa dimanĉo. La plilongigo al tuta semajno ebligis pliajn ekskursojn: al la VW-fabriko en Wolfsburg, al la mezepoka urbo Goslar kun sia imperiestra palaco kaj al la apuda Wolfenbüttel – loko de kastelo kaj fama biblioteko, kiun iam estris Gotthold Ephraim Lessing. Bonŝance la suno brilis preskaŭ dum la tuta semajno.

Por la Germana Esperanto-Asocio la centa kongreso ankaŭ estis okazo fari iom da statuta laboro. La “Federacia Asembleo” (jarĉefkunveno), interalie, elektis novan estraron – ankaŭ novan generacion de estraranoj. Mi mem post la statuta maksimumo de ses jaroj forlasis la prezidantecon. Nova prezidanto fariĝis profesoro Martin Haase, bone konata al multaj el ni el GEJ kaj TEJO. La estraron forlasis ankaŭ nia trezoristo Matthias Hecking kaj mia edzino Barbara, kiu prizorgis la administradon. Pri la kontinueco zorgos Andreas Emmerich kiel vicprezidanto, Andreas Diemel, Nils Brinkmann, Franz Kruse kaj Michaela Stegmaier. Novaj estraranoj estas Reinhard Pflüger (jam duan fojon kiel trezoristo), Jean-Paul Kuhfahl kaj Steffen Möller. Nova reprezentanto de GEJ en la estraro (antaŭe Michael Vrazitulis) nun estas Jonas Schulz. Por resumi mian sperton dum ses jaroj: estis multege da laboro, sed plej ofte valoris la penon. Kaj estis kuraĝige kunlabori kun teamo de simpatiaj kaj fidindaj gekolegoj. Al la posteuloj mi deziras sukceson!

Mi revenis el Braunschweig iom pli optimisma ol antaŭe, ne nur ĉar mi esperas nun havi pli da libertempo. Du impresojn mi volas aparte menciigi, ĉar ili pli ol antaŭe evidentiĝis dum la nuna kongreso. Unue la junularan aranĝon KEKSO (mi ĉiam forgesas kion signifas tiu akronimo) kun aparta programo, sed nur kelkajn cent metrojn for de la kongresejo. Ĝi nun kreskis al pli ol tridek partoprenantoj – inkluzive la ĉinojn el Poznań, kiuj tie konatiĝis kun la koncepto de amasloĝejo. Por niaj kongresoj, kiuj ofte similas al kunvenoj de la tria aĝo, estas bone ke junularo kaj meza generacio fariĝas pli videblaj. Due: jam dum pasintaj kongresoj ni ofertis Esperanto-kursojn por surlokaj komencantoj, sed kutime venis nur malmultaj. En Braunschweig la tutsemajnan kurson partoprenis 20 personoj el la tuta federacia lando Malsupra Saksio (kiu eĉ agnoskis ĝin kiel elekteblan por “kleriga libertempo”: tiom, ke necesis fari du grupojn kaj trovi plian instruiston).

Kongresoj estas nur momentoj en la vivo de asocio, sed ili donas la ŝancon montri, ke Esperanto restas aktuala. Ke tiu momento bone sukcesis, tion ni dankas antaŭ ĉio al LKK, preskaŭ la sama kiel lastjare en Oldenburg. Pri la centa nun ankoraŭ memorigas la specialaj poŝtmarkoj (jes: ili ankoraŭ validas kaj estas mendeblaj ĉe GEA) kaj paketo da jubileaj keksoj (minusklaj), kiujn ni konservas por taŭga okazo.

La 101a GEK en 2024 estos komuna: ni jam antaŭiĝojas pri la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo.

Ulrich Brandenburg

Koncertas Kimo + Radio Mondo (Foto: Stefan Krieghoff)





En la Antverpena stacidomo (Foto: Vito Tornillo)

La 74a IFEF-kongreso

De la 6a ĝis la 11a de majo 2023 okazis en Antverpeno la 74a kongreso de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF) kun la temo “Daŭripovo de la fervoja transporto”. La kongreso estis samtempe unu el la eventoj organizataj kadre de la projekto Verden subtenata de la EU-fonduso Erasmus+.

La kongreson partoprenis preskaŭ cent vizitantoj el 12 eŭropaj landoj. La solena inaŭguro okazis en la salono Thomas More de la Antverpena universitato kun ĉesto de gravaj gastoj el Antverpena provinco kaj Antverpena distrikto.

La programo de la kongreso estis ĉefe dediĉita al laborkunsidoj de IFEF, dum kiuj oni priparolis raportojn de estraranoj kaj unuopaj laborgrupoj, organizajn aferojn, strategion por venonta periodo, preparadon de la kongresoj por sekvontaj jaroj kaj multajn aliajn. Dum fakaj kunsidoj estis prezentataj prelegoj kun enhavo tuŝanta la ĉefan temon de la kongreso, ekzemple, prelego pri kalkulado de emisioj de transporto, alia prelego pri intermodala transporto, sed estis ankaŭ prelegoj pri fervojaj teknikaj aferoj, projektoj ktp.

La ĉefaj prelegoj estis du: la unua estis dediĉita al historio de la unua pasaĝera fervojo sur la eŭropa kontinento kaj la dua al stacidomoj en Belgio/Antverpeno el

la vidpunkto de arkitekturo kaj kultura fono. Dum la IFEF-kongresoj estas ankaŭ regule traktataj fervojaj terminologiaj aferoj. El tiu vidpunkto la belga kongreso ne estis escepto, ĉar IFEF rekte kunlaboras kun UIC (Internacia Fervoj-Unio) pri kompletigado de internacia fervoja vortaro – RailLexic kaj necesas reagi al senĉese aperantaj novaj terminoj kaj precizigoj.

En la programo estis ankaŭ Esperanto-kurso kaj atelieroj. La unua ateliero prezentis al partoprenantoj ludon je speciala muzikinstrumento – fretocitro, kaj la dua temis pri kreado de retejo pri biciklotransportado en trajnoj, kiu estas unu el rezultoj de la projekto Verden. Ambaŭ atelieroj estis multnombre vizititaj kaj bone taksitaj.

La vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj aranĝoj – Flandra vespero kun tipa muziko kaj bildprezentado, koncerto de violonistoj kaj teatraĵoj. Kutima aranĝo dum niaj kongresoj estas ekskursoj. Dum la kongreso okazis vizito de la ĉefa Antverpena stacidomo – la belega Antwerpen Central, promenado tra la historia centro de la urbo, vizito de la Antverpena haveno, fervojstacio Meldegen kun etŝpura fervojlinio kaj trajneto kun vaporlokomotiveto, kaj ne laste ankaŭ vizito de la fama fervojmuzeo TrainWorld en Schaarbeek. Ĉiuj ekskursoj estis tre interesaj kaj donis al partoprenantoj multajn impresojn kaj novajn informojn.

Tuj post la kongreso sekvis postkongreso en Charleroi/Valonio, dum kiu la partoprenantoj vizitis famajn kaj interesajn lokojn – la memoraĵkomplekson en Bois du Cazier, iama karbominejo, kie okazis katastrofo en 1956 kun multaj mortintoj. Alia vizito celis al Namur – la ĉefurbo de la Valona Regiono kun ĝia fama citadelo, kaj dum la lasta tago estis vizitita teknika unikaĵo – ŝiplifto de Strépy-Thieu.

La 74-a IFEF-kongreso enviciĝis inter aliaj sukcesaj kaj neforgeseblaj kongresoj de fervojistoj-esperantistoj.

Ladislav Kovář



IFEF en Antverpeno (Foto: Lode Van de Velde)

La 103a Brita Kongreso: Senduba sukceso

Okdek esperantistoj partoprenis la 103an Britan Kongreson, kiu okazis la 21-23an de aprilo en Kembriĝo, gastig-urbo de la tria Universala Kongreso en 1907. Kunvenis preskaŭ ĉiu aliĝinto la vendredan vesperon en Lord Ashcroft Building de Anglia Ruskin University por vige partopreni leĝeran kvizon gvidatan de Tim Owen.

- ☑ La novtradiciiĝinta unuavespera kvizo kun proksima rilato al la kongresurbo estis amuza, lerniga kaj por UEA-fonduso enspeziga. *(Malcolm Jones)*

Ĉar pasintjare en Conwy la gajnintoj ĝuste respondis ĉiujn 15 demandojn, ĉi-jare estis 16 por ebligi novan rekordon. Plian fojon la gajninta teamo ĉiun demandon ĝuste respondis. La venontan fojon supozeble devos esti do 17!

Sekvis poste refreŝigaĵoj kaj bufedo. Estas domaĝe, ke la kongresejo ne antaŭe klarigis, ke necesos resti en mallarĝa koridoro. Estis kelkaj sofoj kaj foteloj flanke, sed la plejmulto estis devigataj stari manĝante. Tio kompanse ebligis babiladon kun diversaj grupoj, dum cirkuladis la ĉeestantoj, kaj tiel miksiĝis novuloj kun homoj pli spertaj.

- ☑ Varma kaj amikema etoso, kiu ebligis al partoprenantoj libere interŝanĝi. *(Chantel Allen, Francujo)*

Sabate matene

La unua mateno komenciĝis ne per la planita prelego de Hanso Becklin – reveninta ĉefpreleganto, post elstara kontribuado en Conwy – sed per krizeto: la sekureca teamo en la kongresejo ne malŝlosis la pordon de la ĉefa ĉambro.

Post eble kvaronhoro da malfruo Becklin komencis la unuan el tri prelegoj: “Rimedoj por rimi sentime”. Li klarigis, ke fulma tradukado de nova infanlibro ne devus esti treege defia, des pli kiam la teksto ne estis tre ampleksa, sed la afero ne estas same, kiam la tuto havas takton kaj devas rimiĝi. Tion li mem spertis, tradukinte *Tro da aĵoj*, novan infanlibron lanĉitan dumkongrese.

- ☑ La prezenta stilo de Hanso Becklin treege konvenis por mi. Liaj klara prononco kaj leĝera rapido ebligis, ke ĉion diritan mi – kies aŭdkapablo lastatempe malpliboniĝis – kapablis sekvi. *(Jack Warren)*

Kondukante la ĉeestantaron tra la teksto de la libro, Hanso preparolis sian strategion, la defiojn, kaj ankaŭ la tradukarton ĝenerale. 14 ekzempleroj de la nova libro vendiĝis dum la tuta semajnfino – rezulto belega!

Surscenejiĝis tuj poste Stela Besenyei-Merger – kiel la usonano, ankaŭ ŝi la duan sinsekvan jaron estis invitita prezenti. Ŝia temo estis MoVeMo: la Monda Verk-Monato. Temas pri projekto, en kiu oni dum tridek sinsekvaj tagoj klopodos verki, traduki aŭ legi por plifortigi sian kutimon okupiĝi pri Esperanto-literaturo. Iniciantinte la projekton, Stela klarigis, kiel ŝi sukcesas elteni la taskon.

En la subaj tekstoj estas sume 100 vortoj, kies fino mankas.
 Kompletigu ilin laŭsence.
 Necesos enskribi tiom da literoj – aŭ je unu pli –, kiom da literoj videblas en la unua parto de la vorto.
 (Se vi skribas x-metode la ĉapelitajn literojn, la du signoj kalkuliĝos je unu litero!)



ekz.: la kato ku hieraŭ sub la tap → la kato ku^{is} hieraŭ sub la tapi^{ŝo}
 la kato ku hieraŭ sub la tap → la kato ku^{xxis} hieraŭ sub la tapi^{ixxo}

Akireblaj poentoj: 10

1. Eŭropa kunlaboro "Viva Libera Danuba Ĉielo"

Ĉiun printempon kaj ĉiun aŭtunon migras milionoj da sovaĝaj birdoj. La ok kun elektraj kond kaŭzas alt dudak elce de morto de popolacio. Fos kaj elektraj dra estas do in la grandaj min ĉiuj migr birdoj. Al ĉi ti riskaj fakt rilatas no (titolon). Ĝi prez unikan ekze de granda inter kunlaboro la rivera kon ripozejo kaj travi de multaj spo de la 1-an de septembro 2020. Ĝin finance subtenas Eŭropa Unio per 6 638 170 eŭroj.

Kembrigo: Katalin Kováts rakontas pri KER

Ne estis forgesitaj niaj novuloj: samtempe kiam estis prezentantaj Hanso kaj Stela, Elizabeth Stanley okupiĝis pri la komencantoj. Ŝi entuziasme raportis poste, ke ŝi konstatis grandan diferencon inter tiu ĉi grupo kaj antaŭaj; supozeble pro Duolingo kaj la reto, ĉiuj estis ĝis iu aŭ alia grado jam parol-kapablaj!

Sabate post-tagmeze

Tiel populara estis la kongreso kompare kun la antaŭaj, ke estingiĝis timoj pri eventuala defcito, kaj estis decidite aldoni trian invitoton al la programo: Katalin Kováts, ĉefredaktoron de edukado.net kaj la Esperantiston de la Jaro 2010. Tamen ne pro tiuj pasintaj atingoj ŝi invitiĝis, sed pro tute freŝa: la starigo de retaj ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro, inkluzive de la nova nivelo C2. Ŝi prezentis unue la ekzamenojn al la spektantaro, kaj due atestilojn al Maŭrizio Giacometto kaj Tim Owen, kiuj sukcese trapasis la unuan ekzamensesion je C2 en novembro.

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

La 39a PSI okazis denove reale

La 39a Printempa Semajno Internacia (PSI) okazis ĉi-jare en Wittenberg, la Luther-urbo, Saksio-Anhalto, post trifoja nuligo. Al la renkontiĝo venis 117 partoprenantoj el deko da landoj por komune ĝui la etoson de Esperantujo kaj komune festi Paskon. La ĝojo de revido estis videbla en ĉiuj vizaĝoj kaj la brakumoj estis des pli koraj.

La programo abundis per prelegoj, ekskursoj (kaj en la urbo Wittenberg, kiu estas plena de historio pri reformacio, kaj en la ĉirkaŭaĵo), sportaj kursoj, Esperanto-kursoj por komencantoj kaj progresantoj, kaj manlaboro (ĉio dank' al la ofertoj kaj subtenoj de la partoprenantoj). La semajno estis partigita en temaj tagoj, kiel Wittenberg-tago, Bauhaus-tago (Dessau), Vendredoj-por-la-estonteco-tago kaj Wörlitz-tago, kiuj estis akompanitaj per la koncernaj prelegoj.

La partoprenantoj povis aŭskulti prelegojn i.a. pri la arkitekturo de Bauhaus, pri lingva terapio de la menso (de lernantoj kun milda intelekta nekapablo), pri projekto de Reta Lernejo, pri trajnvojaĝo al 107a UK en Montrealo (fotoprelego), pri imuneco kaj vitaminoj, pri BEMI kaj projekto VeloRelo (bicikloj en trajnoj). En diskutrondoj oni povis interŝanĝi opiniojn pri temoj kiel klimata justeco, Esperanto en la klimata krizo, kaj la angla kaj Esperanto en komparo.

Memkompreneble ne mankis sportaj aktivaĵoj kiel jogo, ĉigongo, zumbo, malstreĉiga gimnastiko kaj akrobataĵoj, kiuj estis ĉiam bone vizititaj de partoprenintoj.

En la manlaborejo ne nur la infanoj kaj junuloj sed ankaŭ la plenkreskuloj povis pruvi sian artan lertecon. Tio ankaŭ eblis dum la desegna kurso kun Helga Plötner kaj la kursoj pri ŝtofkolorigado kaj origamio.

Post la ekskursoj kaj vespermanĝo okazis la vesperaj programeroj: la filmo "June kaj Kune" de TEJO, la koncerto de Esperanto-kanzonoj de Feri Floro, la teatraĵo "Drakofajro" de Christoph Frank, muziko kaj dancado dum la mezepoka kostuma

PSI estas festivalo por esperantistoj de ĉiuj aĝoj (Foto: Liba Gabalda)



balo kaj finfine la babilado en la knajpo. La internacia vespero kun humuraj, dancaj kaj akrobataĵaj prezentoj finis la Paskan renkontiĝon.

La vetero en la PSI-semajno favoris kaj dorlotis nin eĉ kun printempaj temperaturoj kaj blua ĉielo – malgraŭ la tute alia veterprognozo. Tiel la rostita bastonpano dum la Paska fajreto des pli bone gustis.

Sekvis dum Paska dimanĉo la paska ovoserĉado por la infanoj kaj junuloj, longa tradicio ĉe PSI, kiu estis akompanata de kuna kantado kaj sekvita de kuna dancado. La tempo ĝis la vespermanĝo forflugis dum la ludposttagmezo por ludemaj, scivolemaj infanoj kaj plenkreskuloj.

Tiel longe estis atendita tiu reala Printempa Semajno Internacia, kaj tiel rapide, tro rapide, ĝi pasis. Pri la konkreta programo dum la PSI daŭre troviĝas informoj ĉe psi.esperanto.de/2023. En 2024 ni renkontiĝos en la moderna junulargastejo Bayreuth dum la 40a Printempa Semajno Internacia!

Aliĝo jam eblas ĉe: psi.esperanto.de.

Dank' al subteno de PSI per EU-rimedoj de Erasmus+ ni povis ĉi-jare doni certajn rabatojn al niaj programkontribuantoj – sed tio estu rigardata kiel escepto. Ni ankaŭ povis subteni kelkajn partoprenantojn dank' al la Familio-Fischer-Fondaĵo – koran dankon.

Dank' al la subteno de Flandra Esperanto-Ligo por la aranĝita/organizita libro-servo, libroŝatantoj povis provizi sin per novaj libroj kaj revuoj, kiel jam dum multaj pasintaj/estintaj Printempaj Semajnoj Internaciaj.

Kaj nun ankoraŭ informojn en propra afero: post la forpaso de Helmut Klünder la PSI-teamo ŝrumpas denove! Stefan Krieghoff forlasos la teamon post la ĉi-jara PSI. Ankoraŭfoje grandegan dankon pro lia laboro pri kontraktoj, ĉambrodisdonado, varbado, financoj kaj retpaŝaro. Stefan pretas ĝis la fino de 2023 akompani sia(j)n posteulo(j)n en la diversaj areoj kaj iloj. Pro tio la PSI-teamo urĝe bezonas novajn kunorganizantojn por la multaj diversaj taskoj antaŭ la renkontiĝo. La taskoj estas tro abundaj por nur du familioj (kvar personoj) por organizi kaj garantii kontentigan renkontiĝon. Ĉiu helpo estas bonvena. Kontakti nin ĉe psi@esperanto.de.

Per via helpo ni revidos nin en Bayreuth 2024!

**Ralf Haumer
Stefan Krieghoff**

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mez-Kanada renkontiĝo

La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) estas turisma semajnfino, kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en majo, t. e., la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario.

Ĉi-jare MeKaRo okazis la 20-22an de majo. Ni ĝuis kampan ekskurson en la regiono de la Georgia Golfeto, centrigita en la turisma urbo Midland. Oficiale parto de la Granda Lago Huron, kaj ofte nomata la “sesa granda lago”, la Georgia Golfeto estas trezorkesto de abunda natura beleco, kun longa historio de homa navigado.

Niaj ekskursoj inkluzivis du urbojn, Midland kaj Penetanguishene (mallonge Penetang), kies nomo (“lando de la blankaj ruliĝantaj sabloj”) venas en la anglan tra serio de pluraj indiĝenaj lingvoj. La plurlingvismo ankoraŭ vivas ĉi tie. Survoje al Penetang ni trapasis la franclingvan vilaĝon Lafontaine, kie ĉiujare en julio okazas la Festivalo de la Lupo, celebros de franc-ontaria kulturo kaj muziko. En la apuda Christian Island, hejmo de la Unua Nacio Beausoleil, oni nun instruas la aniŝnabekanan lingvon al junuloj.

Tradicie la Georgia Golfeto estis kaj la dividilo kaj la ligo inter du grandaj grupoj de indiĝenaj nordamerikanoj – la parolantoj de la irokezaj lingvoj, pli sude, kies kulturo centrigiĝis je agrikulturo, kaj la parolantoj de la algonkiaj lingvoj, pli norde,



vasta kaj forta kulturo de ĉasistoj-kolektistoj. Dum jarcentoj, tiuj du aroj de kulturoj intermiksiĝis kaj evoluiĝis, kaj ŝanĝiĝis precipe rapide post la aldono de la franca kaj angla kulturoj en la sama regiono. Jam dum du jarcentoj, la Georgia Golfeto estas populara kaj amata destino por ferioj de homoj en la regiono de Toronto.

Ĉi-jare 39 homoj partoprenis en MeKaRo. Ni ĝuis la ĉeeston de kvar infanoj kaj du beboj. Ilia ĉeesto starigis kvazaŭan infanan kongreseton, nova aldono al MeKaRo. La infanoj intermiksiĝis kun la plenkreskuloj kaj plijunigis la etoson.

Por pliaj informoj vizitu la retejon <http://mekaro.ca/>.

Parker Glynn-Adey

Kultura semajnfino de Svisa Esperanto-Societo

La trian de junio 2023 Svisa Esperanto-Societo (SES) kunvenis en Bulle, kantono Friburgo, regiono Grejerco (la fama fromaĝo Gruyère devenas de tiu regiono). Kuintimo estas, ke ĉirkaŭ la laŭstatuta Ĝenerala Kunveno okazas ankaŭ kultura evento, enhavoriĉaj vizitoj kaj/aŭ prelegoj.

La kultura semajnfino 2023 de SES komenciĝis en Romont, kie situas muzeo pri vitro kaj vitraloj en la urba kastelo. En Bulle la grupo povis viziti la muzeon pri la regiono Grejerco, belan institucion kun originala prezento de tradiciaj mebloj, iloj, muzikiloj... Pentraĵoj kaj fotoj ebligas malkovri la malnovajn vivkondiĉojn de la kamparanoj de tiu regiono. Sekvis vizito de la urbo Bulle kun ĉiĉerono, kiu devenis el Eŭskio. Vespere ni eksciis pri la aktivado de BEMI, la TEJO-sekcio de biciklantoj.

Dimanĉe kelkaj membroj veturis al la najbara urbeto Gruyère, kie kastelo ricevas plej multe da vizitantoj. Pro la fakto, ke Gruyère aperas en diversaj aziaj gvidlibroj pri Svislando, abundis gastoj en tiu suna dimanĉo. En restoracioj oni servis fonduon, en vendejoj turistoj aĉetis fromaĝon, kelkaj lokanoj aperis en tradiciaj kostumoj, bovinoj aperis en la ĉirkaŭaj paŝtejoj, ĉio kontribuis al la ĝojo de la alvenintoj. Aliaj muzeoj altiras vizitantojn en Gruyère: muzeo pri Tibeto kaj muzeo pri la artisto H. R. Giger (1940-2014), kiu kontribuis per siaj desegnaĵoj al la filmo *Alien*.

Por elekti la lokon de tia ĉiujara kunveno la Estraro de SES havas du eblojn: elekti centran lokon, kiel Bernon aŭ Zurikon, por altiri multe da membroj. Alia eblo estas kunveni en ĉelima loko, tiel ke najbaraj esperantistoj venu por renkonti svisajn samideanojn. Tiel SES foje kunvenis en Thal, kantono Sankt-Galo, kaj vizitis la belegan bazarohalon konstruitan de la aŭstra artisto Hundertwasser. Kelkaj personoj venis el Aŭstrio.

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Oni ankoraŭ debatas, ĉu esperantistoj estas popolo, komunumo, grupo aŭ io alia, sed certe ili estas socia grupo kun malklaraj limoj, kiu iras de ĵusaj komencantoj al veteranoj, kaj ankaŭ ili havas siajn festojn, inkluzive de la 26a de julio, la dato de la apero de la Unua Libro en 1887. Legu artikolon de la laborgrupo de UEA pri la Esperanto-Tago, p. 49-50.

Deklaro de la Akademio de Esperanto pri la Esperanta litero ŭ

La 9an de aprilo 2023, per jeso de 86% el la voĉdonintoj (43 el la 45 akademianoj voĉdonis), la Akademio aprobis la jenan deklaron:

Deklaro pri la Esperanta litero ŭ

A. La Akademio de Esperanto konstatas, ke

1. la Esperanta litero ŭ plej ofte aperas en la sonkombinoj “aŭ” kaj “eŭ”;
2. eĉ inter spertaj esperantistoj ne regas konsento pri la demando, ĉu la litero ŭ estas permesebla ankaŭ en aliaj pozicioj, kaj se jes, en kiuj pozicioj;
3. la Gramatiko de la Fundamento de Esperanto (en siaj germana kaj rusa versioj) instruas, ke ŭ estas uzata nur post vokaloj;
4. ekzistas provoj anstataŭigi la malmultajn ekzistantajn Esperantajn radikojn, en kiuj ŭ ne estas antaŭata de *a* aŭ *e*, per aliaj radikoj aŭ esprimoj, ekzemple “poŭpo” per “pobo” aŭ “ŝipvosto”, kaj “ŭato” per “vato”.

B. Detale studinte la problemaron, la Akademio

1. rekomendas, ke, proponante novan Esperantan radikon, oni evitu uzi en ĝi la literon ŭ en alia pozicio ol en la sonkombinoj “aŭ” kaj “eŭ”;
2. rekomendas – depende de la situacio – uzi *v* aŭ *u* anstataŭ ŭ, kiam oni kreas novan Esperantan radikon surbaze de nacilingva esprimo enhavanta la sonon de ŭ (aŭ similan sonon) ne antaŭatan de *a* aŭ *e*;
3. agnoskas, ke la Fundamenta kaj plej kutima nomo por la litero ŭ estas “ŭo”;
4. akceptas, ke en elkri-esprimoj kaj sonimitoj la litero ŭ povas aperi en aliaj pozicioj ol en kutimaj Esperantaj radikoj, ekzemple silabkomence aŭ inter konsonanto kaj vokalo (kiel ekzemple en la zamenhafa elkri-esprimo “ŭa” kaj en la sonimito “kŭaks”);
5. opinias, ke, indikante la prononcon de fremdaj esprimoj per Esperantaj literoj, oni uzu ŭ por indiki sonon egalan aŭ tre similan al la Esperanta prononco de ŭ sendepende de la pozicio de la sono en la koncerna esprimo, ekzemple Wells [ŭelz] kaj Pwani [pŭani], tamen konsciante, ke tia prononcindiko ne estas esperantigo.



La nacia festo de esperantistoj: La 26a de julio ĉiujare



Ĉiu lando havas sian nacian feston. Kutime temas pri la dato en kiu okazis grava evento por la nacia komunumo: akcepto de la baza leĝo/konstitucio, venko en milito, fino de milito (kiun oni malvenkis), naskiĝo de la reĝo, forigo de la reĝo kaj starigo de respubliko, ktp. Oni ankoraŭ debatas, ĉu esperantistoj estas popolo, komunumo, grupo aŭ io alia, sed certe ili estas socia grupo kun malklaraj limoj, kiu iras de ĵusaj komencantoj al veteranoj, kaj ankaŭ ili havas siajn festojn. Lastatempe apud la pli konata, almenaŭ en Eŭropo, la Zamenhof-tago de la 15a de decembro, komencas aperi nova kvazaŭnacia festo, la 26a de julio.

Se ni estas verkantaj ĉi tiujn liniojn kaj vi estas leganta ilin, tio ŝuldiĝas al la 26a de julio. Sen ĝi ni ne estus parto de la Esperanto-movado/komunumo/civito/grupo/klubo/asocio (elektu laŭplaĉe). Kio okazis la 26an de julio 1887? Io relative banala kaj apenaŭ atentata de la tiama mondo. Aperis en Varsovio libreto kun la titolo en la rusa lingvo: “Международный языкъ. Предисловіе и полный учебникъ”, alivorte: Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro. Do, la tiel nomata “unua libro de Esperanto”, kiu poste aperis en aliaj lingvoj. Por havi ideon pri tio, kion la mondo atentis anstataŭ atenti libreton aperintan en Varsovio: en Britujo en tiuj tagoj oni estis festanta la oran jubileo pro 50 jaroj da regado de la reĝino Viktoria, kaj ĝuste antaŭ kelkaj tagoj Zulu-lando estis iĝinta parto de la brita imperio.

Sed tiu libreto havis efikon, kiu postvivis la finon de la brita imperio kaj naskis serion da eventoj, kiuj kreis mondvastan komunumon de Ĉinujo al Londono kaj de Aŭstralio al la Baltaj landoj por ne paroli pri Mongolujo kaj Ameriko.

Do, tiu mondvasta komunumo rajtas festi la daton de sia apero, la 26an de julio, kaj post jaroj da provoj nun fine UEA decidis voki la esperantistojn por festi ĝin laŭ du planoj. Unuflanke esperantistoj simple konduku, kiel kondukas ĉiuj aliaj homoj, kiuj festas similajn festojn. Ili festu per kunvenoj, ceremonioj, festaj manĝoj, ekskursoj, donacoj, bondezirado, gazetaraj konferencoj, kaj ĉiu alia agado konvena laŭ la lando kaj la lokaj sociaj moroj.

Oni ankaŭ profitu la okazon por informi neesperantistojn pri nia ekzisto kaj pri la kialoj de nia ekzisto. Kaj en mondo ĉiam pli militema kaj ĉiuokaze firme intencita detruu sin mem pro troa ekspluatado de la planedo, la afiŝo pretigita de la oficejo de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj ŝajnas al ni tre taŭga por priskribi nin kaj nian ekzistojn.

La dua plano de la festado estas internacia kunordigita agado por atingi la

deklaron de la Monda Tago de Esperanto (la 26a de julio) fare de Unesko, kio estas tre malfacila, ĉar tiajn deklarojn faras la Ĝenerala Asembleo de Unesko, en kiu decidas la reprezentantoj de ĉiuj membro-ŝtatoj. Do, esence almenaŭ unu ŝtato devas proponi tion kaj la aliaj devas voĉdoni por ĝi. Unesko de tempo al tempo deklaris tiajn tagojn, laste pri la afrika lingvo svahila (kiu tamen jam ricevis similan agnoskon de UN) kaj estas lingvo vaste parolata en Afriko.

Ne estas facile antaŭvidi, kiom da tempo la tuta monda Esperanto-movado bezonos por trovi la bezonatan subtenon de kelkaj ŝtatoj, sed la provo estos potenca okazo por informi pri Esperanto la naciajn Unesko-komisionojn, la ministeriojn pri eksteraj rilatoj, la ĵurnalistojn kaj do entute meti la movadon pli en la publikan vivon de la landoj.

Sed ni esperas kiel esperantistoj.

Renato Corsetti
François Lo Jacomo
Humphrey Tonkin

Laborgrupo de UEA pri la Esperanto-Tago

Nur du seksoj en Esperantio

La legitimiloj de la Esperanta Civito, iom post iom distribuataj al la individuaj petintoj, enhavas kiel kutime kodon, kiu ekas per litero M aŭ F. Temas pri diskreta maniero indiki la sekson de la civitan(in)o. Kial tiu indiko? “Mankas specifa normo de la Civito, tial la Registro devas kongrui kun la koncerna svisa normo, laŭ la Civita Konstitucio”, klarigas sen. Manuela Blanco, vickonsulo pri internaj aferoj, kiu citas lastatempan kazon.

En 2019 svisa ŝtatanino vivanta en Berlino ŝanĝis sian personan nomon, kiun ŝi maskligis, kaj petis forigon de la indiko pri sia sekso ĉe la matrikulo. Ambaŭ aferoj eblas laŭ la germana leĝo. Reveninte al Svislando, ŝi (verŝajne jam li) petis la samon ĉe sia municipo. Pri la persona nomo ne estis problemo, sed la matrikulo rifuzis la nemencion pri sekso. La konflikto evoluis ĝis la federacia Kortumo, kiu pravigis la rifuzon.



Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Zagrebo, 3. 11. 1923.

Bonan tagon, kara Julio! Ha, vi miras, ke mi tiel baldaŭ, neatendite aperas antaŭ viaj okuloj. Vi supozis, ke mia vizito okazos post kelkaj semajnoj, ke via malriĉa rusa amiko certe ne povus vin viziti en la tagoj de januara kaj februara bilanca febro en la banko. Vi jam kvi-
ete vin preparis al la vizito je ia norda direkto kaj viaj gantoj estas pli varmigaj ol ordinare... Sed ne miru kaj ne kaŝu vian subitan distrecon. Mi ne restos ĉe vi, mi komprenas kion signifas mia neatendita vizito al fraŭle-loĝanta amiko, kiu eĉ malatentis hodiaŭ la ordon en sia ĉambro. Krom tio mi estas kune kun mia edzino. Ŝi estas kun mi. Jes, jes, ŝi staras ĉi tie apude kaj ri-

Ni daŭrigas aperigi historian materialon pri Nikolaj Ĥohlov. Ĉi-foje ni publikigas lian leteron al Julio Baghy, skribitan en Zagrebo antaŭ cent jaroj, la 3an de februaro 1923. Ĉi tiu letero estas interesa pro tio, ke ĝi enhavas kelkajn alineojn de lia edzino Vera Ĥohlova, vd. p. 59-66.

Jubileoj kaj memordatoj en julio 2023

4. Antaŭ 15 jaroj mortis **Lee Chong-Yeong** (1932-1948-2008), korea fakulo pri komerca administrado kaj esperantisto; vicprezidanto (1990-94) kaj prezidanto (1994-95, 1998-2001) de Korea Esperanto-Asocio, komitatano (1989-2007), prezidanto (1995-98) kaj vicprezidanto de UEA (2001-04), membro de ties Elekta Komisiono (2006-07), lanĉinto de "Kampanjo 2000", kuniniciatinto de la unua Nitobe-simpozio en la 81a UK (Prago, 1996), reprezentanto de UEA en pluraj internaciaj konferencoj; redaktoro de *La Lanterno Azia* (2001-04), aŭtoro de *Esperanto en la 21a jarcento* (2001), *Esperanto, la lingvo de la 21a jarcento* (koree, 2001), *Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj* (2003), *La 80-jara historio de la korea Esperanto-movado* (koree, 2003), *Ridante lernu* (2007), *Elektitaj Zamenhofaj proverboj* (tr. el Esperanto, 2008), *Amuze lernu* (posteume 2011); honora membro de UEA (2004), honora prezidanto de KEA (2001), honora konsiliano de JEI (2005).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 172-174).

5. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Ivan Vasiljeviĉ Lubjanovskij** (Лубяновский, 1893-1908-1972), ruslanda kaj sovetunia esperantisto, tradukinto de multaj poemoj de Puŝkin, Lermontov kaj aliaj (entute 48) rusaj poetoj, kiuj aperis en *Amikeco*, *La Suda Stelo*, *La Ondo de Esperanto*, *Norda Prismo* kaj en aliaj Esperanto-gazetoj, ankaŭ kiel samizdataj fotolibretoj.

11. Antaŭ 35 jaroj mortis **Gaudenzio Pisoni** (1920-1959-1988), itala instruisto de literaturo, lernejestro kaj esperantisto, tradukinto el la itala (Leopardi, Lorenzo de' Medici, Ungaretti, Montale, Quasimodo k. a.), poeto kaj recenzanto, plurfoja premiito en la Belartaj Konkursoj de UEA, membro de la literatura rondo La Patrolo, kunlaboranto de *Literatura Foiro* kaj aliaj Esperanto-gazetoj.

15. Antaŭ 45 jaroj mortis **Lajos Tárkony** (1902-1919-1978), hungara financ-oficisto kaj esperantisto, konata en Esperanto ankaŭ kiel Ludoviko Totsche, aŭtoro de la poemaro *Soifo* (1964) kaj artikolaro *De paĝo al paĝo* (1932) pro kiu li estas konsiderata kiel la unua serioza literaturkritikisto en Esperanto; kunredaktoro de *Literatura Mondo*, kunlaboranto de *Hungara Vivo* kaj Esperanto-fako de la Hungara Radio, tradukinto de *Vojaĝo en Faramidon* de Frigyes Karinthy (1934) kaj *Dudek horoj* de Ferenc Sánta (kun aliaj, 1966).

18. Antaŭ 115 jaroj naskiĝis **Ĥristo Marinov Iskrov** (1908-1925-1999), pli konata kiel Ĥristo Gorov, bulgara verkisto, tradukisto, ĵurnalisto, partia kaj ŝtata funkciulo kaj esperantisto; prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio (1960-64, 1976-87), komitatano de UEA (1977-89); aŭtoro de *Poemo de l' plugisto* (1930),

Ĉe abismo (1932), *Du frontoj* (1932), *Ribela kordo* (1983), *Mia verda pado* (1986); tradukinto de verkoj de Botev, Jovkov, Karaslavov, Smirnenki kaj aliaj bulgaraj aŭtoroj, kompilinto de kelkaj antologioj. Honora membro de UEA (1999).

19. Antaŭ 130 jaroj naskiĝis **Wanda Zamenhof** (denaske: Frenkel, 1893-1954), pollanda kuracisto, bofilino de Lazarj Markoviĉ Zamenhof (edzino de Adamo Zamenhof kaj patrino de Ludoviko Zamenhof-Zaleski), partopreninto de pluraj UKoj ekde la 4a UK (Dresdno, 1908).

26. Antaŭ 136 jaroj (1887) en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis la **“Unua Libro”** de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof – la naskiĝdato de Esperanto.

• Legu pli en la artikolo *La unua libro* de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2020/07/unua>.

30. Antaŭ 40 jaroj (1983) en Budapeŝto komenciĝis la **68a Universala Kongreso de Esperanto** kun 4834 aliĝintoj – rekorda nombro antaŭe neniam atingita.

Aleksander Korĵenkov

Kiom da poŝtistoj en Sovetunio sciis Esperanton?

En la vintra *Ondo* aperis artikolo pri la rezulto de la lasta Ruslanda censo, laŭ kiu en la 2021a jaro en Ruslando estis nur 753 esperantistoj.

La Peterburga esperantisto Anatolij Sidorov anstataŭ komenti ĉi tiun vende mizeran nombron, sendis al nia redakcio artikoleon, aperintan en la revuo *Sennaciulo* (1927, №158), kiu montras, ke laŭ la enketo, aranĝita de la Popol-Komisario (= ministerio) pri Poŝtoj kaj Telegrafoj de Sovetunio, kiu koncernis ĉirkaŭ ¾ de la fakanoj (92 mil 788 poŝtistoj, telegrafistoj, radiistoj), Esperanton sciis 676 poŝtistoj.

Ni ne scias, kiom da poŝtistoj estas inter la nunaj 753 esperantoparolantoj en Ruslando.

La red.

| Nomo de l' poŝta distrikto | Neperforte konas la lingvon | Flue parolas la lingvon | Sume | El tiu nombro estas da virinoj |
|------------------------------------|-----------------------------|-------------------------|------------|--------------------------------|
| Blankrusia | 23 | 10 | 33 | 4 |
| Supra-Volga | 28 | — | 28 | 4 |
| Voronej'a | 20 | 13 | 33 | 4 |
| Supra-Kama | 6 | 2 | 8 | 1 |
| Orient-Siberia | 42 | 6 | 48 | 10 |
| Ekstrem-Orienta | 27 | 2 | 29 | 1 |
| Transkaŭkazia | 4 | 3 | 7 | — |
| Kazakia | 12 | 1 | 13 | 2 |
| Moskva | 59 | 6 | 65 | 9 |
| Malsupra-Volga | 27 | 3 | 30 | 3 |
| Norda | 23 | 2 | 25 | 2 |
| Nord-Okcidenta | 33 | 6 | 39 | 9 |
| Nord-Kaŭkazia | 40 | 7 | 47 | 9 |
| Mez-Azia | 13 | 6 | 19 | 3 |
| Siberia | 42 | 2 | 44 | 3 |
| Mez-Volga | 45 | 5 | 50 | 5 |
| Urala | 37 | 5 | 42 | 6 |
| Sud-Okcidenta | 17 | 4 | 21 | 2 |
| Suda | 34 | 12 | 46 | 7 |
| Moskva ĉefa Poŝtejo | 17 | 5 | 22 | 4 |
| Moskva ĉefa | | | | |
| Telegrafejo | 3 | 5 | 8 | 2 |
| Moskva ĉefa Telefonejo | 2 | 1 | 3 | — |
| Popola Komisario por P.-T. | 12 | 3 | 15 | 3 |
| Tra U. S. S. R. | 567 | 109 | 676 | 93 |

La tria letero de N. Hoĥlov al J. Baghy

Zagrebo, 3. II. 1923.

Bonan tagon, kara Julio! Ha, vi miras, ke mi tiel baldaŭ, neatendite aperas antaŭ viaj okuloj. Vi supozis, ke mia vizito okazos post kelkaj semajnoj, ke via malriĉa rusa amiko certe ne povus vin viziti en la tagoj de januara kaj februara bilanca febro en la banko. Vi jam kviete vin preparis al la vizito je ia norda direkto kaj viaj gantoj estas pli varmigaj ol ordinare...

Sed ne miru kaj ne kaŝu vian subitan distrecon. Mi ne restos ĉe vi, mi komprenas, kion signifas mia neatendita vizito al fraŭle-loĝanta amiko, kiu eĉ malatentis hodiaŭ la ordon en sia ĉambro. Krom tio mi estas kune kun mia edzino. Ŝi estas kun mi. Jes, jes, ŝi staras ĉi tie apude kaj ridetas. Nature ŝi petis min iome ekscii, ĉu vi estas disponita por nia neatendita alveno.

Kara Julio, ne faru la mastrumajn movojn. Mi invitas vin, ke vi tuj eliru kaj migru kun ni iomete tra la stratoj de via belega urbo. Poste ni venu al iu kafejo, al iu intima ĝia anguleto kaj interparolu... Ho ne, ni ne estas lacaj, ne timu. Ni bone dormis kaj la cirkonstancoj ĉiam estis favoraj al ni dum la vojo, kiel ili ĉiam estas sur la vojo kun bonintence vojaĝantaj homoj...

Do, dank' al Dio, vi estas tre pacema homo kaj vi ne igis nin longe atendi. Jen ni estas ambaŭ Vera kaj Nikolao. Sed kiam ni parolas gee, ni uzas la telegrafan terminon: "Veroniko". Certe vi aŭdis en Siberio la rusajn kutimojn nomi la nomojn de konataj homoj kun aldono de la patra kristana nomo. Do vi ne miros, kiel multaj niaj zagrebaj amikoj, ke mia edzino estas Vera Aleksandrovna kaj mi Nikolaj Ivanoviĉ.

Kiel bela estas via Budapeŝto! Kiaj majestaj pontoj kaj stilaj konstruaĵoj!

Ha, pardonu, certe ne estas kavalire, ke mi sola ĉion babilas. Mia edzino tiel volas paroli kun vi. Vole aŭ nevole ŝi nun volas repagi por ŝia silentado dum via vizito al ni. Ĉu vi ne forgesis, ke vi plej parte tiam parolis nur kun mi?

Ne, ne, min ne ĝenas mia devigata silento. Mi kun plezuro observas vian elparolon de vokaloj de nia belsona lingvo. Tre ĝusta kaj sonora. Ni rusoj, kiam ni ne atentigas vian parolon, ĉiam manĝas la finiĝojn kaj a-igas o-on. Kion fari! Precipe mi, la moskvano, kie oni ĉiam a-igas la neakcentitan "o", tre suferas je tiu manko. Sed pardonu, pardonu...

... "mi ne estas tiel bona esperantistino kaj tiom sperta, kiel vi opinias, estimata amiko, sed mi vin certigas, ke viajn versojn mi profunde komprenas kaj kio estas grava – ĝuas ilin...

... estis tre strange, kara amiko, ke vi ĉe la unua via vizito al ni, ne rimarkis, ke tion kion vi nomis "samovaro" ĉe nia tablo estis simpla tekruĉo, aĉetita en Zagreb, kun surstampo de malsupre "MADE IN GERMANY". La samovaroj restis en Moskvo...

... kaj vi tiel malmulte da sukero uzis. Mi estis rememorinta niajn tagojn en sovjeta Rusujo, kiam pro la sukera krizo, oni nur rigardis sukerpecon dum la te-trinkado!..

Ĉe ni vi ne devas tiel ekonomie dolĉigi la teon...

... mi certe pli bone lernus paroli Esperanton, se mi havus al ĝi la saman pasion, kiel mia edzo. Ĝenerale mi ĉiam pli rapide lernas la lingvojn, ol mia edzo. Li estas en Kroatujo je unu jaro pli multe ol mi, kaj tamen li ne parolas kroate pli bone ol mi, eĉ kontraŭe...

... jes, ni ne venis en Zagrebon kune. La edzo evakuita kun la armeo de generalo Wrangel¹ venis tra Konstantinopolo kaj nur poste, kiam li ricevis la oficon, mi alveturis ankaŭ Zagrebon el Varsovio.

... el Varsovio? Tiel ke mia gepatra lando estas Polujo. Mia patro estis ruso, la patrino pursanga polino... jes, mi parolas pole tre bonege...

... lastfoje mi estis en Varsovio de 1919 ĝis 1921 jaro. Dum tiuj jaroj mi nenion sciis pri mia edzo, kia kaj kie ĝi estis... certe estis terura stato kaj tiu eksperimento dezertigas mian animon, se ne la sento, kiu nin..."²

Kara Julio, ĉu vi ne trovas, ke la kafejo ĝuste kontraŭ ni estas perfekta por nia ripozo kaj interparolo. Ĝi aspektas pura kaj malbrua.... Do mi ne eraris.

II

Humpf! Bonega gluto da bonega kafo kun plej bonega maĝara lakto! Post ĝi la homoj aspektas bonaj kaj humoro varmiĝas...

Nu, kara Venjo³, mi alportis al vi la plej interesajn ilustraĵojn multajn kaj freŝajn. Se ili povus vin konsoli dum mi babilos kun Julio, mi tre ĝojus kaj mi konsilas al vi plidolĉigi la situacion per unu taso da ĉokolado. Jen, bonega vi estas! Dio donu ke mi ĉiam restu inda de via obeemo!..

Kara Julio... Unue – tiu ĉi tono kiun mi tiel abrupte aplikas por nia interparolo, la familia tono ne estas mia ĉiama tono. Vere, neniu el miaj zagrebaj amikoj aŭ aŭdis ĝin, aŭ estis leginta en ĝi leteron. Mi estas homo konservema por miaj amikaĵoj kaj sentoj. Do se mi tamen ĝin uzas – tio sola montru al vi la tutan mian simpation.

Do, kara Julio, mi ne povas alie juĝi vian amikan leteron ol vera elmonro de kunfrataj sentoj. Mia animo efektive malfermiĝis antaŭ vi en la antaŭaj miaj linioj, ĉar mi vidis, ke mi libere povas doni al vi la manon.

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Post la verkoj de Ivan Bunin (marto 2022), Aleksandr Kuprin (junio 2022), Maksim Gorjkij (septembro 2022), Fjodor Sologub (decembro 2022) kaj Leonid Andrejev (marto 2023) en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento, aperas kvin verkoj de Ivan Ŝmeljov.

Koncize pri Ivan Ŝmeljov

Ivan Sergéjeviĉ Ŝmeljov (Шмелёв) naskiĝis la 21an de septembro (Gregorie: la 3an de oktobro) 1873 en entreprenista familio. Post la hejma edukado li studis en gimnazio kaj en la jura fakultato de la Moskva universitato. Fininte la universitaton, li plenumis armean servon kaj laboris en advokatejo en Moskvo. Dum 1901-07 li kun sia familio (en 1893 li edziĝis kun Oljga Oĥterloni, en 1896 naskiĝis ilia filo Sergej) laboris kiel impostoficisto en Vladimira gubernio, ofte vojaĝante kaj akirante sperton, poste uzitan literature. En 1907 li forlasis la ŝtatan servon, revenis al Moskvo kaj dediĉis sin al literaturo.

La unuaj verkoj de Ŝmeljov – eseoj kaj rakontoj pri provinca Ruslando – ekaperis meze de la 1890aj jaroj, sed lia nomo diskoniĝis nur post dek jaroj pro *Civitano Uklejkin* (1907), kaj la populareco venis al li en 1911 pro la romaneto *La homo el restoracio*. Sekvis pliaj verkoj, kiuj estis legataj en la tuta Ruslando, sed la bolŝevista revolucio draste ŝanĝis lian vivon. Ŝmeljov kun la familio fuĝis el la bolŝevista Moskvo al Krimeo. En novembro 1920 la Ruĝa Armeo okupis Krimeon kaj inter dekmiloj da ĝiaj viktimoj estis ankaŭ la blank-armea oficiro Sergej Ŝmeljov, mortpafita en januaro 1921.

Ŝmeljov neniam pardonis la ruĝulojn, kaj elmigrante kun sia edzino al Francio li publikigis en 1923 la rekviemecan verkon *La suno de l' mortintoj*, kies legadon la filozofo Ivan Iljin jene priskribis: “Jen al mi ŝajnis, ke la homo ne plu povas vivi en ĉi tiu mondo pro la honto, jen ŝajnis, ke Dio terurigas pro tio, ke Li kreis la homon”.

Post kelkaj jaroj, dum kiuj li verkis ĉefe kontraŭbolŝevistajn artikolojn kaj pamfletojn, Ŝmeljov revenis al beletro kaj metis la ĉefan atenton al la “malnova rusa vivo”, kun amo priskribante popolajn kaj religiajn morojn, festojn kaj tradiciojn. Tiaj estas lia romano *La pilgrimado* (1931) kaj la trilogio *La somero de l' Sinjoro* (1 *Festoj*. 2 *Ĝojoj*. 3 *Malĝojoj*), komencita samtempe kun *La pilgrimado*, sed finverkita nur meze de la 1940aj.

En 1936 mortis lia edzino. Li restis sola. Kiam la Hitlera armeo frakasis la Eŭropajn ŝtatojn kaj atakis Sovetunion, li unue akceptis tion kiel justan liberigon de Rusujo el la demona bolŝevista jugo. Tiu mistakso por pluraj jardekoj baris la vojon de liaj verkoj al la rusa legantaro en Sovetunio.

Post la milito li vivis en soleco, mizero, malsanoj... Ivan Ŝmeljov mortis la 24an de junio 1950 en la rusortodoksa monaĥejo en Bussy-en-Othe. Kvindek jarojn poste liaj restaĵoj estis resepultitaj en Moskvo. Sed jam pli frue, fine de la 1980aj jaroj, oni komencis presi liajn verkojn en lia patrujo.

La tradukintoj akceptis la defion traduki kelkajn esence rusajn verkojn kun malnovaj realaĵoj kaj kun fono kultura kaj spirita, bone konataj al rusoj, sed ne al alikulturaj legantoj. Verkojn kun ŝajne “nekombita” lingvaĵo, jen tro trankvila kaj kontempla, jen simila al tiu de ekstreme ekscitita homo, ĵus spertinta animan krizon kun kvazaŭ hasta kaj pelmela rakontado, ripetado de vortoj, stranga interpunkciado, nesufiĉa poluriteco...

Ĉu la tradukintoj sukcesis? Legu kaj respondu ĉi demandon.

Aleksander Korĵenkov

Ivan Ŝmeljov

LA FEBRO

I

Komence de la printempo la vivo de la juna pentristo Kaĉkov, kiu vivtenis sin plejparte per lecionoj, tute disfalis. Lia vivo ĝenerale ne estis gaja, krome mortis lia patrino, kiun li tre amis. La publiko atentis lian pentraĵon “La betuloj”, en kiu li sukcese pentris la printempan sunon, sed ĝi ne estis aĉetita. Tio frakasis lian revon veturi eksterlanden kaj ripozi. Kaj komence de la printempo ankaŭ lia sano ŝanceliĝis. Lia samĉambrano, medicina studento, perkutis lin kaj konsilis al li fini siajn lecionojn kaj vojaĝi al Krimeo. Dum la Sankta Semajno[1] la lecionoj ne okazis, sed Kaĉkov ne intencis veturi.

Dum la antaŭpaska sabato la loĝejo estis precipe haladza kaj brua. De la frua mateno, la kupra pistujo sonoritis, oni konstante klakis per io, la pordoj frapis, kaj la luigantino denove postulis kvin rublojn de luanto, kiu servis kiel komizo. Trans la muro la studentino Miloĉka ofte mungis, kaj ŝajnis, ke ŝi ploras: verŝajne, ŝiaj parencoj ne sendis monon el Orjol, kaj ŝi ne veturos hejmen por la festoj. Al la oficisto loĝanta trans la alia muro, venis gastoj, kiuj tre bruis, kaj en la koridoro kontraŭ la pordo, la junulo Peĉjo, kiu prepariĝis por la abiturienta ekzameno, ĉiun kvinan minuton vokis la serviston kaj demandis: ĉu oni alportis al li la botojn.

Kaĉkov kuŝis surlite kaj mezuris sian temperaturon. Ankaŭ la studento kuŝis, metinte la piedojn sur la litodorson kaj legis ĵurnalon.

– Neniu ŝanĝo, – diris Kaĉkov, rigardante la termometron. – Tridek sep komo ok.

– Bagatelo. Provu arsenikon... Sed prefere veturu al Jalto. Vi ricevos kuraclokon en iu publika sanatorio...

Kaĉkov kuŝis surdorse, kaj lia pala, razita vizaĝo tre memorigis al la studento Julion Cezaron; same pergamena kaj seka, kun agla nazo.

– Tiu tumulto agacas min... – diris Kaĉkov plendeme. – Tedis al mi vagi tra la ĉambroj, aŭskulti galimaton. Por labori mi bezonas vervon, sed ĉe ni estas vantaĵoj, botoj, kvereloj...

– Veturu al Jalta, – diris la studento, al kiu tedis aŭskulti.

– Jen nia arto! Unu pentras akvon, alia pentras nubojn aŭ ĉevalojn... Mi pentras betulojn, – li rigardis siajn sunplenajn betulojn. – Bone, sed ĉu tio estas la arto?! Necesas, ke la arto piku la animon... kirlu kiel tornado! Jen tia devas esti la arto! Kia revelacio! La arto estas... natura, krea forto...

Trans la muro, Miloĉka eksaltis, ekaplaŭdis kaj ekridis, kaj ili aŭdis:

- Hura! Mi veturos!
- Oni alportis monon, – la studento diris.
- Kaj sciu, – Kaĉkov daŭrigis, – ja mi fastis.
- Ĉu?

– Mi volis izoli min de ĉio, simpliĝi... senti min kiel antaŭe. Kiel dum mia infanaĝo, kiam... en la animo estis iel tre klare kaj bone... kaj ĉio estis saturita de mirinda aromo. Tiam mi kapablis senti la odoron de neĝo, de printempaj flakoj... kaj inter la fenestraj kadroj odoris la vento kaj suno! Kaj kia estis la ĉielo! La nuboj floris, kaj ŝajnis al mi, ke ĉi tiuj estas ne nuboj, sed mia ĝojo flosas kiel blankaj cignoj sur blua akvo. Kaj alaŭdoj kun rosinaj okuloj! [2] Ili estis kvazaŭ vivaj alaŭdoj kaj odoris printempon, kaj mi bedaŭris ekmanĝi ilin de la beko. Kaj kiam mi fastis, ĉio estis tiel speciala, festa, ankaŭ mi estis tute speciala, la plej bona kaj ankaŭ festa, kaj mi estis rekompencota pro tio. En ĉi tiu stato oni povas krei!

– Jes, eble... – la studento diris el post la ĵurnalo.

– Kaj mi volis fari tian eksperimenton. Mi iris al monaĥejo, elektis malnovan, foran... Post la vespera antaŭfesta diservo mi iris en malluman angulon, fermis la okulojn, iomete staris... kaj mi elektis por konfeso monaĥon maljunan. Ŝajnas, ke neniuj iris al li, ial ili iris al dikulo. Kaj li eĉ montriĝis iom surda... nu, li faris ĉion, kvazaŭ mi estus knabo...

– Kaj do?

– Ial mi sentis malĝojon, tamen mi ricevis kvieton. Poste mi marŝis kaj rigardis al la steloj. Kaj mi preskaŭ rekonis ĝin, la malnovan, konatan ĉielon... la ĉielon de mia infanaĝo...

– Vi ja estas mistikulo! – la studento diris.

– Lastatempe mi pensas pri multo. Ankaŭ pri Dio mi pensas. Pri tiu infanaĝo, bonkora Dio... Jen mia patrino... dum sia tuta vivo ŝin batis mizero, kaj fine ŝi mortis, vidinte neniun ĝojon. Kaj tamen ŝi konservis sian infanecan kredon je iu granda vero. Kaj se vi demandus ŝin, ŝi ne kapablu klarigi. Kio ĝi estas? Kaj milionoj da ordinaraj homoj... Kiom da mizeroj, ofendoj, suferoj!.. Sed ili vivas kaj kredas. Kaj la vivo iom post iom formiĝas kaj iras al iu granda celo. Tra tiuj suferoj bildiĝas la hela vizaĝo de la vivo, tra jarcentoj... granda estonteco estas aĉetata... – diris Kaĉkov reveme kaj triste.

– Ili nur vivas kaj mortas kaj pensas pri neniuj vizaĝoj, – diris la studento post paŭzo, – sed ili lasas ion post si. Nu, mi ne parolos kun vi pri via vero. Ni estas tro malsamaj...

Miloĉka frapis la pordon.

– Sinjoroj, mi forveturas! Mi festos la Paskon dum la vojo, kaj morgaŭ en la hejmo!

Kaj ŝi forflirtis. Aŭdiĝis, ke ŝi paske interkisas en la koridoro kun la luigantino.

– Rapide ŝi gajiĝis, – la studento diris. – Kaj ĉiuj tiel. Ĉu mi iru al barbirejo?

La luigantino venis por montri, kiel bone ŝi bakis la paskan kukon [3]. La najbaro

oficisto venis kaj petis korktirilon. Poste la junulo Peĉjo timeme enŝovis sian grizan vizaĝon kun ruĝaj aknoj en la pordon kaj konfuzite petis uzi iliajn botojn: li devas aĉeti ion, sed la ŝuisto ankoraŭ ne alportas la liajn. Kaĉkov donis al li siajn ŝuojn por unu horo. Poste la luigantino denove venis kaj flustre raportis, ke al la telefonistino “denove tiu ulo sendis florojn”. Poste la servistino Manjo frapis la pordon kaj petis, ke iu skribu ŝian gratulkarton kun ora ovo en konvaloj kaj kun kruco – al iu Nikolao Petroviĉ Koroljkov.

– Manjo, Manjo, ĉu vi ne hontas? Vi forgesis min! – diris la reveninta studento kaj donacis al ŝi rozan ovoforman sapon kun kanaletoj.

– Ja mi al la fianĉo donacos, – Manjo diris kokete.

– Mi vin pardonas kaj benas. Jen ŝi turniĝas kiel turbo, sed trovis por si fianĉon... kaj ne pensas pri iu ajn vizaĝo de la estonteco, – la studento diris kaj komencis elpaki la aĉetaĵojn.

Li eligis paskan kazeaĵon[4] altan je tri verŝokoj[5] kaj paskan kukon je kvar, kun papera rozo.

– Ĉu nemalbele farita? Bel-bele!

– Ĉu vi tamen aĉetis?

– Mi, frato, aĉetis ankaŭ ĉi tiujn... blankaj estas enuigaj, kaj jen la simbolo!

Kaj, ridetante en siajn lipharojn, li eltiris kvin ruĝajn ovojn kaj ĉirkaŭis per ili la paskan kukon.

– Gaje! Krome mi akiris unu aĵon, – li elpakis sukeran ovon. – Nur en butiketoj eblas trovi. Unue... pa-no-ra-mo: musko bildiganta la verdaĵon de printempo, kaj krome... la simbolo! Kaj kostas nur dudek kopekojn. Ĝin mi donacos al konata damo kvinjara...

Kaj li fiksas ĝin sur la muron.

– Kaj nun mi manĝos la paskaĵon.

Tamen li ne ekmanĝis, sed kovris ĝin per kloŝeto kaj ŝovis ĝin trans la fenestron.

Kaĉkov denove ekfebris. Li kovris sin per plejdo kaj ekdormetis. La gastoj de la oficisto komencis stamfi kaj tinti. La studento iris al la telefonistino por kartludi. Baldaŭ li revenis kaj foriris, kunpreninte la gitaron.

Kiam Kaĉkov vekiĝis, li rememoris, ke li devis iri ien, aĉeti ion aŭ viziti banejon. Estis malvarme kaj li ne volis ellitiĝi. Jam estis vespera suno en la ĉambro, kaj suna rebrilo dancis sur la tapeto. Ĉi tiu vespera lumo estis konata, la antaŭfesta lumo de printempa vespero. Poste ĉi tiu lumo komencis ruĝiĝi, paliĝi, moviĝi, kaj la malvarmeta ĉielo ĵetis rigardon tra la fenestro.

Ĉe la oficisto estis kvieto. Kvieto estis ankaŭ en la tuta loĝejo. En la koridoro la junulo Peĉjo flustre petis Manjon iri al la ŝuisto kaj finfine postuli. Manjo snufis kaj ĵuris, ke ĉiuj metiistoj jam diskuris. Peĉjo diris per plorema voĉo:

– Vin tio ridigas, sed kiel mi iru sen botoj?!

– Mi rekompencos vin per miaj ŝuoj, enŝovu paperon en la ŝuojn kaj iru do... – diris la voĉo de la studento.

En la ĉambro estis tute malhele.

– Ninjo ja estas bela! – la studento diris, fingroklakante. – Kovris ŝin per floroj iu arogantulo.

– Kaj vi venadas kaj flaradas! – Kaĉkov diris kolere.

– Mi ne rifuzas, mi respektas belajn virinojn. Sed kion ni faru nun? Ĉu ni iru al Kopĉikov?.. La tramoj jam ne veturas...

Kaj li kuŝiĝis.

– Kaj min denove atakas febro... – Kaĉkov diris. – Fia okazo.

– Mi ja diras – veturu al Jalto!

Ili ne plu parolis. Ne estis klare, ĉu la studento dormas aŭ kuŝas kaj cerbumas. Sed Kaĉkov cerbumis. Bildiĝis al li – “La Silento”. Maldensejo en betula bosko, vespero. Ankoraŭ estas ruĝeta brilo sur la arbopintoj. El la mallumiĝinta herbo atente rigardas grandaj bluaj kampanuloj. Staras pala junulino, rigardas al la ĉielo, aŭskultas la silenton...

– Estas kvieto en nia arkeo, – diris la studento. – La oficisto foriris por ebriiĝi, kaj la junulo parkerigas sian latinon. Kaj por kiu diablo li bezonas la supinojn? Li, stultulo, prefere venu al sia Ĉerjomuĥov, servu tie en la distrikta fisko, amindumu knabinojn. Filozofo dirus: jen agas la elementa forto de la vivo, el la etaj fortoj, kiuj sidas sen botoj, iom post iom riveliĝas plej mirinda vizaĝo de la fora estonteco, kaj...

– Pripensu, kion vi diras! – Kaĉkov respondis kolere. – Tio estas cinikismo!

– Ne ĝenu min, mi koleras hodiaŭ. Vi malĝojigis min!

La horloĝo de la luigantino batis la dekan horon.

– Nu, mi iru...

La studento ŝaltis la elektron kaj komencis surmeti amelitan kolumnon. Poste li surmetis novajn ŝuojn kaj elĵetis la malnovajn en la koridoron.

– Ricevu!

Ŝajnis, ke Peĉjo atendis. Li saltis el sia pordo kaj diris feliĉe:

– Kiel bone vi por mi aranĝis! Ja estis tute senespera situacio...

– Ĝuste.

Poste la studento frapis sian frunton, prenis gratulkarton kaj sidiĝis por skribi.

– La patrinon mi ja forgesis. Sed ŝi ŝatas tion... ankaŭ fasti ŝi ŝatas. Do, jen... kaj nun mi iru aŭskulti la sonorilojn...

– Sciu, ankaŭ mi iros, – diris Kaĉkov.

– Vane. Vi povas infektiĝi...

– Ne gravas. Mi ĉiam pasigis ĉi tiun nokton sub la ĉielo. Mi povas surmeti subĉemizon. Ĉiam kun homoj... – diris Kaĉkov, surmetante siajn ŝuojn. – Kaj hodiaŭ precipe... Vi povas ridi, sed la paska nokto ĉiam liberigis min de ĉio bagatela, ĉiutaga... ĝi donis al mi humoron!..

Li parolis tiel sincere, ke la studento ne diris la kutiman, kiel “vi idiliumas” aŭ “ĉesu perturbi la cerbon”. Li nur rigardis al la flokaj haroj de Kaĉkov kaj diris ŝerce:

– Sciu do... Vi ege similas al Cezaro!

II

Kiam ili eliris al la strato, estis nekutime kviete. Ie bojis hundo, kaj ŝajnis, ke se ili fermus la okulojn, ili estus en iu fora distrikto. Kaj la ĉielo estis speciala: tiel ŝajnis al Kaĉkov.

– Ĉiam en ĉi tiu nokto, – li diris, – ŝajnas al mi, ke oni la ĉielon refarbis en novan bluan, kaj la steloj estis lavitaj por ke ili brilu feste.

– Oni kretis ilin...

Estis preterpasantoj kun blankaj saketoj. Sur la angulo, ĉe la preĝejo de Gregorio la Novcezarea[6], staris policano kaj parolis al iu nevidebla:

– Pasintjare pluvo malsekigis – kaj la rezulto ne estis taŭga...

La preĝejo odoris je junipero. Post la malhela barilo knaboj tuŝludis, kurante kun kandelstumpoj kaj kriante: “Kaptu min! Kaptu min!”

– Du mil jaroj pasis, sed la ideo ne mortas, – Kaĉkov parolis, provante batali kontraŭ la tremado, kiu kontrahis liajn lipojn. – Elaĉeto de iu granda malvero per grandioza sinofero! La plej bona fordonas sin por ĉio, en la nomo de la plej bela! Mi ne diras, ke mi kredas blinde kaj laŭlitere. Estu tio nur mito, mi ne scias... sed se ĝi estas mito, en tiu okazo – kaj eĉ pli – ni devas adore kliniĝi antaŭ la homaro, kiu kreis ĝin! Kliniĝi antaŭ la Spirito! Ja ili estas la herooj de spirito kaj penso, se ili sukcesis elpensi tion. La plej granda donas sin al malhonoro, al morto, por mortigi la morton! Al tia homaro, post kiam ĝi sukcesis leviĝi al ĉi tio kaj honori ĝin – malgraŭ ĉiuj ĝiaj eraroj – oni povas ĉion pardoni, ĉion! Oni povas kredi je tia homaro!

– Vi ekscitiĝas, sed tio estas malutila al vi, – diris la studento.

Ju pli ili iris, turnante sin en stratetojn, ne sciante kien ili iras, nur por paŝi – la studento mem sugestis iri tien, kien iliaj okuloj rigardas, tiel estis pli interese – des pli multajn homojn ili renkontis sur la stratoj. Iometa frosto venis, kaj glacio bone kraketis sur la flaketoj. Plejparte iris ordinaraj homoj, kaj ilia lingvaĵo estis nekutima, sed ankaŭ iel lavita, kun gaja kaj bona alarmo.

– Mi aĉetis por mi kaskedon novan, studentulan... – Kaĉkov aŭdis kaj vidis ke kaskedo leviĝis de ies kapo kaj denove revenis sur sian lokon.

Ili venis al placo, kie nevidebla voĉo krie vokis fiakriston. Sed fiakristoj mankis.

Denove estis preĝejo ĉe la angulo, malalta, malrekta, kiel kazea paskaĵo, malnova. Iu paŝis en la korto kaj per kurba kandelo sur bastono lumigis kolorajn kubajn lampojn. La preĝejo estis malfermita, estis ankoraŭ mallume en ĝi, kaj denove la junipero odoris.

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Emeritiĝo

de Paulo Sérgio Viana



Estis la deka vespere; mi preparis min por enlitiĝo. Mi devas klarigi, ke mia ĉiu-vespera preparo por enlitiĝo estas sisteme ripeta, kvazaŭ rito: mi boligas iom da akvo por teo, mi verŝas la ĉiaman teon en mian preferatan, tute blankan tason, mi malfermas la laŭvican libron, kaj legas en ĝi la kutimajn dek paĝojn, kiuj normale sufiĉas por alvenigi la dormemon. Post ĉiu paĝo, unu plezura engluto el la blanka ujo. Tiun apartan vesperon mi estis leganta rakontojn de klasika verkisto, sobra kaj eleganta stilisto, vere taŭga por antaŭenlitiĝo. Fakte mi relegis ilin, kiel mi ofte faras, kiam temas pri sobra kaj eleganta aŭtoro: relegadon oni ĝuas eĉ pli. Kun aldona avantaĝo, ke tiaj aŭtoroj protektas maljunulon de inkuboj kaj aliaj nekonvenaj sonĝoj.

Kiam mi finis la okan paĝon kaj denove proksimigis al miaj lipoj la amikan tason, jen bruego skuis min. Pan, pan, pan!... Trifoja kruda frapado sur la pordo de mia apartamento. Mi eksaltis, kaj kvankam mi estis certa pri la horo, mi rigardis la horloĝon kaj konfirmis: estis la deka vespere. Absolute neatendebla horo por frapado sur mia pordo! Des pli, ke tio estis kruda, tro forta, preskaŭ skandala frapado, kiu indikis eventualan urĝon. Mi alkuris kaj malfermis la pordon.

Fronte al mi staris mia kolego N., kaj li aspektis tute konsternita.

– Lasu min enveni por momento! – li laŭtis, preskaŭ krie. – Mi estas frakasita!...

Liaj okuloj estis malfermegitaj, larmantaj, ruĝaj. Liaj malmultaj grizaj haroj estis distaŭzitaj, iom falintaj sur la frunto. Lia vizaĝo prezentis torditajn trajtojn, pala kaj malseka de stranga ŝvitado. Li tuta iom tremis.

– Mi estas detruita! Permesu, ke mi sidigu min...

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (1)

de Miguel Fernández



En la pasinta numero de *La Ondo de Esperanto* (2023, №315), parolante pri Alberto García-Teresa, nome la aŭtoro de deksepo da mikronoveloj, kiujn mi tiuokaze elhispanigis por vi ĉiuj, mi asertis, ke li estas i.a. senlaca kultura aktivulo. Kaj mi eĉ rakontis al vi la konsiston de unu el liaj kuriozaj aranĝoj. Temis pri migra opa poemdeklamado en diversaj placoj de la madrida populara kvartalo Malasaña. Kune kun ĉirkaŭ 24 pliaj gepoetoj, mi estis invitita partopreni tiun mirindaĵon en du okazoj, en 2017 kaj en 2018, kaj, petite de García-Teresa kaj aliaj kamaradoj, deklamis miajn poemojn en la hispana kaj en Esperanto, kio estis simpatie akceptita de la tuta kolegaro.

Tio havigis al mi la eblon konatiĝi kaj amikiĝi kun ne malmultaj interesaj gepoetoj. Unu el ili, la poetino Vera Moreno, min aparte interesis i.a. pro sia kultivado de socikritika poezio parola, sursceneja, spektakla... De tiam mi havis la plezuron ĉeesti plurajn el ŝiaj poeziaj “spektakletoj” kaj ĝui la fajnon kaj profundon de ŝiaj poemoj. En №29 (Junio 2017) de *Beletra Almanako* mi prezentis i.a. kelkajn el ŝiaj versoj kaj prozaĵoj. Nun mi ĉi-kadre prezentas miajn elhispanigojn de ses ŝiaj poemoj kiel unuan aliron al la nuntempa hispana poezio verkata de virinoj, sekvotan de almenaŭ du pliaj en venontaj numeroj de *La Ondo*.

Virinoj, depostulo de vira-virina egalrajteco, engaĝiĝo kaj defendo de la subprematoj konsistigas la ĉefpunktojn de ŝia poezio.

Petite de mi, ŝi verkis jenan biografian noton por ĉi okazo:

Vera Moreno (Madrido, 1972).

Poetino. Persono. Licenciĝis pri sociologio ĉe la Madrida Universitato UCM kaj magistriĝis pri arto kaj literaturo en la Madrida Aŭtonoma Universitato UAM.

Amanto de la vortoj, la plantoj kaj la hundoj, kio certas, eĉ se oni ŝanĝas la vort-ordon. Defendanto de la naturo, la nehomaj bestoj kaj la kritika pensmaniero.

Amanto de la scenejoj, la sursceneja poezio kaj la literaturo, kiam ĝi interagas kun la realo. Leg-ama, malgraŭ la trompoj de la 21a jarcento.

Ĝis nun, ŝi publikigis tri poemarojn: *La Naranja entera* [Kompleta oranĝo] (Amar-gord, 2016), *el gimnasio de los rotos* [la gimnastejo de la rompitoj] (Denes, 2020),

kiu ricevis la poezi-premion César Simón de la Valencia Universitato, kaj *como la nieve, el fuego* [fajro, samkiel neĝo] (Huerga & Fierro, 2023).

Ŝiaj verkoj ricevis diversajn literaturajn premiojn kaj tradukojn en la nederlandan, la anglan kaj Esperanton. Pluraj el ili aperis en antologioj pri poezio, noveloj kaj mikronoveloj.

Jen, en mia traduko, la seso da poemoj, kiujn Vera Moreno elektis por *La Ondo de Esperanto*:

Kiam la lampiroj silentas

Oni kantas ankaŭ pro doloro, kiam oni ne povas plori
*Chavela Vargas*¹

Oni vin nomas onjo Vargas,
kaj vi estas la arbo, kiun ni ĉirkaŭbrakas
en amaraj momentoj.

Vi, tekil-ama, akvumu miajn radikojn kaj sur via arĝenta fadeno
rajdu,
ĉar Federico² vin atendas.
Donacu al mi viajn flugilojn – aŭdacajn, grimpajn – kaj sur via arĝenta fadeno
rajdu,
ĉar Frida Kahlo³ riprenikas vian alvenon.

Amu min kiel oni amas la branĉojn sen frukto,
min, rompitan de l' vento,
dispistitan de ŝtormo.

Kantu al mia vundo, ĉar, ĉe veno de l' doloro,
la lampiroj silentas.

(La originala hispanlingva versio de ĉi poemo aperas ene de kolekto de elektitaj poemoj kadre de la premio Voces Nuevas [Novaj Voĉoj], de la eldonejo Torre-mozas. Madrid)

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kandido: Dokta solvo de pluraj krizaj punktoj

Voltero (ps. de François Marie Arouet le Jeune). *Kandido, aŭ Optimismo* / Tradukis el la franca Sergio Pokrovskij; Antaŭparoloj de Sergio Pokrovskij kaj Eŭgeno Lanti; Postparolo de Sergio Pokrovskij. – Kaliningrado: Sezonoj, 2023. – 176 p. – (Literatura suplemento al *La Ondo de Esperanto*, 2022).

Voltero

Kandido, aŭ Optimismo



Por recenzi libron oni kutime startas legante ekde la unua paĝo, sed ĉi-foje la indekso allogas ĝuste pro sia fina parto, tiel anoncita: «La “Postparolo” entenas detalan komparon de la du tradukoj kaj estas destinita por tiuj, kiujn interesas tradukteorio kaj interrilato de Esperanto kaj la franca lingvo». Efektive la lastaj 50 paĝoj ampleksas komentojn diverstipajn, kiuj konsideras ankaŭ alian pli fruan tradukon far Lanti en 1929 kaj tradukojn en aliajn lingvojn (angla, bulgara, germana, hispana, pola, rusa). Tiuj aliaj lingvoj helpas al komparo koncerne kelkajn interesajn temojn: artikolado, vortordo, prozodio, propraj nomoj, patino, aspektoj, mezurunuoj, historia momento de la traduko, eviden-

tigo de la remao* fronte al la temo.

Tio trenas nin al la ĉefa demando tute ĝenerala: kion devas liveri traduko? Ĉu la esprimojn, kiujn uzus la aŭtoro, se li estus samtempulo kun la leganto? Se precize tiel, nu, tradukanto devus aliigi leŭgojn al kilometroj, talerojn al eŭroj, nobelajn epitetojn al nunmoŝtaj, kaj tio kondukus al neceso de ĝisdatigo de traduko pli-malpli je ĉiu dua generacio, ĉar loknomoj, normoj, ŝtatoj, sociaj statusoj rapide ŝanĝiĝas: nobelaj titoloj malaperas, sociaj rangoj alimaniere distribuiĝas, ŝtatoj enprenas aŭ perdas urbojn. Male necesas iom pluteni la patinon de la tempo, tiel ke leganto daŭre memoru, ke la libro pentras situaciojn de la tempo de la aŭtoro; tion faras la nuna traduko tre oportune.

Aparta ĉapitro en la postparolo estas dediĉita al la vortordo: ja oni kutimas diri, ke en esperanto ĝi estas tute libera, kio estas malĝusta (ekzemple la artikolo *la* ĉiam antaŭas la substantivon, kiun ĝi difinas, “la libro sur la tablo” estas ĝusta esprimo, “libro la tablo la sur” estas ja erara).

Esperanto laŭ Pokrovskij bone akordigas la komunikadan vortordon kun la aktiva frazaranĝo. Eble ne pri ĉiu ekzemplita traduko leganto konsentus, ke ĝuste tiu estas la plej bona: ekzemple, la voltera “lorsqu’une vieille l’aborda, et lui dit” estis de Lanti tradukita al “kiam maljunulino aliris al li kaj diris”, dum la Pokrovskija versio

* Remao: lingvistika termino indikanta parton de esprimo, kiu aldonas informojn al tio kio jam estas baze konata (la temo); ekzemple predikato, aŭ ripeto de parto de la ĉefa esprimo. (Kiun direkton mi iru? Ĉu la dekstran aŭ la maldekstran?)

estas “kiam lin aliris maljunulino, kiu diris”; ja pli svelta ĉi lasta, sed mi preferas la Lantian.

La komparo kun alilingvaj tradukoj estas ekstreme interesa, ĉar ankaŭ tiuj tradukoj estas, kompreneble, ne samtempaj inter si: ni staras do antaŭ dokta leciono pri kiel esperantigi tutan aron da terminoj interpretitaj el la voltera tempo, ekzemple la nuna tradukinto aktualigis loknomojn, tiel ke Konstatinopolo iĝis Istanbulo, kaj Propontid iĝis Marmora Maro. Lanti elektis ne akuzativigi proprajn personajn nomojn, Pokrovskij ilin deklinacias.

Subtila estas la traktado de la artikoloj, kaj la difina kaj la nedifina: precipe ĉi-lasta estas esplorata detale, ĉar Pokrovskij interpretas ĝin per specifa tabelvorto laŭ la de li perceptita nuanco:

“Il était au désespoir de se séparer d’un bon maître devenu son ami intime” iĝas laŭ Lanti “Li estis tre ĉagrena pro la penso disiĝi for de bona mastro, fariĝinta lia intima amiko”, dum laŭ Pokrovskij: “Lin tre ĉagrenis la neceso disiĝi for de *tia* bona mastro, fariĝinta lia kara amiko”. Ĉi-rilate estu permesate al mi menci, ke itala traduko de 1882 (bit-eldono Liber liber, 2017) tradukis per poseda adjektivo: “gli dispiaceva di separarsi dal suo buon padrone, divenuto suo intimo amico”. Rimarkindas ankaŭ la malsama traduko de *intime*. Mia komparo preskaŭ laŭvorta kun tiu itala traduko alportus kromajn interesajn konsiderojn, ekzemple pri la ideo “ke eksterulo *faras* ies geedziĝon/nupton”.

Alia temo tuŝata de la diverstempeco inter originalo kaj tradukoj estas la mezurunuoj: por la franca “lieue” Lanti uzis *mejlo*; Pokrovskij, post detala distingo inter la romia, angla, franca kaj germana mejloj, transigas la francan *lieue* al rekompunita *kilometro*, tiel donante konkretan vidon al iu “promeno” kiu verŝajne estas evitvorto por “dizerto”, ĉar fakte la longo, kiun la protagonisto sendisipline formarŝis, proksimumis 9 kilometrojn, iom abunda distanco por promeno. Pri alteco, la rekomputo de futoj kaj coloj al centimetroj klasus Kandidon taŭga por rekrutiĝo (ĉ. 170 cm); pri monunuoj Pokrovskij transigas la *livres sterling* al stelpundoj.

Maleblas komenti ĉiujn flankajn temojn; ili estus tamen menciindaj por indiki kiom detala, skrupula, eĉ pedanta estis la streĉo de la nuna tradukinto por transdoni al ni la plej ekzaktajn datenojn. Malpli indulgaj al la antaŭa tradukinto Lanti estas la konsideroj pri la tensoj, kiujn la franca ofte traktas laŭ la strukturo de la latina *consecutio temporis* (tensa sinsekvo) en la subprepozicio, dum esperanto ne perfektivigas samtempecon en la pasinteco, sed tenas la ~as de la samtempeco. Atenta estas ankaŭ la kritiko kiam temas pri elekto de vorto, kiu en la voltera tempo havis en la franca iun signifon, sed alian poste, kiun Lanti kelkfoje mistradukis laŭ la signifo de la pasinta jarcento.

Multaj aliaj detaloj, pruvantaj la eksterordinaran studadon far Pokrovskij, estus pritrakteblaj ĉi tie, sed, se ni restu ĉe la titolo, la plej interesa komento estas pri la koncepto “optimismo” kaj pri la superlativo “la plej bona el la eblaj mondoj”. Nu, ĉi-lasta esprimo povus indiki eĉ malbon(et)an situacion, kiu tamen estas pli bona

ol ĉiuj aliaj. La tradukinto zorge metas vid-al-vide la Lejbnican optimumismon kaj la anglan optimismon referante al verkoj de Neŭtono kaj de Popo (Aleksander Pope); la rezonado, helpata de citadoj, estas tro intelekta por ĝin analizi tra recenzo, sed ĉar la koncepto pri “la plej bona” estas la esenco de la satiro de la verko, ĝi estas nur analizebla post ties legado.

Do, ni venu al la romano mem kaj al ĝia signifo. Voltero volas per satiro kritiki la lejbnican teorion, predikatan de ties disĉiplo Wolff, ke la mondo estas la plej bona el la eblaj mondoj, ĉar ĉio, kio ekzistas, havas kialon ekzisti. Protagonistas naiva junulo Kandido, kiun instruas pedagogo Pangloso. Li eklernas amoron tra kaŝa enarbara rigardo, enamiĝas al nobela junulino, sed ĉio estas frakasita de milito, al kiu Kandido estas perforte rekrutita. Pluron da kruelaĵoj li devas elteni pro kaŭzoj diversaj, li tamen sukcesas saviĝi. Sekvas aventuraj vojaĝoj pli kaj pli strangaj, mortigoj nepre necesaj por ke la amo triumfu. Tuta sinsekvo da malfacile kredeblaj eventoj, subita ekapero de supozitaj mortintoj, abruptaj bonŝancaj okazaĵoj baldaŭ neniigitaj aŭ minimumigitaj de la sorto: konklude, malgraŭ la predikado pri la plejeble bona el la mondoj, la socioj eŭropaj, prusa, portugala, franca kaj angla, kaj la katolika eklezio, estas peze kritikataj tra ridindigo de agoj absurdaj kaj kruelaj. La romano, amuza pro la intencitaj leĝereco kaj supraĵeco per kiuj ĝi traktas militojn, murdojn, trompojn, perfortojn amasajn mortigojn kaj aliajn pezajn homajn malfeliĉojn, povus esti transskribita al televida felietona serio. Iamaniere la filozofio substanta la romanon povas sinteziĝi tiel: La apartaj malfeliĉoj faras la ĝeneralan feliĉon kaj ĉio ajn ekzistanta estas prava.

Kandido estas inter la plej famaj romanoj eŭropaj, do ne mirigas, ke Lanti, fundamenta skurĝanto de la establita naciaj socioj, ĝin tradukis en la “roraj dudekaj” de la vivo de Esperanto; certe ĝia entuziasma, sed ne tiom skrupula studado kondukis al bona traduko, sed perfekta nek pri fideleco, nek pri kelkloka interpretado. Tial montriĝas nepre la nuna traduko de akademiano Sergio Pokrovskij, kiu regalas nin per ege flua rakontado, per dokta solvo de pluraj krizaj punktoj, tiel ke la verko, kompletigata de la plurĉapitra apendico, lokiĝas inter la vere elstaraj en la esperantlingva kulturo.

Carlo Minnaja



Gardantoj de lingvo: Libro instrua, kleriga, pensiga

Coulmas, Florian. *Gardantoj de lingvo. Dudek voĉoj tra la historio* / Tradukis el la angla Jan P. Sandel; Antaŭparoloj de Florian Coulmas kaj Humphrey Tonkin. – Novjorko: Mondial, 2020. – 464 p.

FLORIAN COULMAS

GARDANTOJ



DE LINGVO

Dudek voĉoj tra la historio

Tradukis Jan P. Sandel

MONDIAL

La libro *Gardantoj de lingvo* de Florian Coulmas estas verŝajne la unua verko rilata al lingvistiko, kiun mi legis, kaj apenaŭ multaj verkoj prilingvaj sekvas ĝin sur mia tablo. Sed mi legis ĝin kun granda intereso kaj povas diri sincere, ke tiu ĉi eldonaĵo estas leginda kaj havinda de ĉiu esperantisto.

Ampleksa kaj strukturita

La libro estas sufiĉe ampleksa (464 paĝoj), kio spegulas enorme vastan temon, kiun ĝi tuŝas, nome – lingvopolitikon kaj lingvoplanadon. Florian Coulmas prezentas dudekon da biografioj, kies herooj, plejparte ne lingvistoj, grave

kontribuis al tiu ĉi sfero.

Ĉiu biografio sekvas pli-malpli saman skemon: unue la aŭtoro rakontas pri la vivo de sia heroo, poste pri la lingva situacio, kiu ekzistis en tiu tempo en respektiva teritorio aŭ medio, foje aldoniĝas prezento de lia intelekta heredaĵo kaj finas ĉion la plej malkutima elemento forme de imagita intervjuo, kreita surbaze de citaĵoj. La verko celas vastan nefakulan publikon. Tamen la scienca aparataro impresas – ĉiun ĉapitron finas abundaj referencoj, inkluzive originalan tekston de la citaĵoj el “intervjuo”, kaj fine de la libro grandan spacon okupas referencoj kaj indeksoj.

La biografioj estas ordigitaj en kronologia sinsekvo – de Alcuinus el Jorko, vivinta en la 8a jarcento, ĝis Léopold Sédar Senghor, mortinta en 2001. Elekto de la personoj estas foje neatendebla – apenaŭ multaj supozis vidi en tiu ĉi listo papon Paŭlon la 6an, Leninon aŭ kardinalon Richelieu. Tamen la aŭtoro ĉiufoje klarigas, kial li konsideras la respektivan personon grava kontribuinto al la anoncita temo kaj liaj vortoj konvinkas.

Avertoj kaj espero

Ne havas sencon rerakonti biografiojn kaj cirkonstancojn en kiuj vivis ĝiaj herooj, do mi prefere prezentu konkludojn kiujn mi faris kiel leganto atenta kaj pensema. Multaj el ili estas aktualaj kaj pensigaj por esperantistoj kaj por Esperantujo.

Imago pri la tiel nomataj “naturaj” lingvoj kiel pri fruktoj de libera kaj nelimigita evoluo estas grave troigita. Fakte ĉiuj lingvoj de grandaj nacioj akiris sian aktualan formon sekve de skrupula planado kaj longdaŭra kaj persista realigado de lingvopolitiko.

Edukita kaj celkonscia elito povas trudi sian volon al la amasoj, eĉ lingvon. Bonaj ekzemploj estas Eliezer Ben-Yehuda, grave stimulinta la renaskiĝon de la hebrea, kaj Sutan Takdir Alisjahbana, gvidinta la formadon de la indonezia lingvo. Do eĉ guto malgranda povas iniciati grandajn ŝanĝojn – necesas nur ke ĝi estus persista, inteligenta kaj, plej gravas, ke ĝi proponu solvon de problemo, kiun la socio mem konsideras aktuala kaj grava aŭ almenaŭ ke ĝi konsciigu la socion pri tiuj ĉi aktual-eco kaj graveco.

De tio ĉi sekvas alia konkludo – por komuna lingvo unue necesas komuna ideo. La hebrea (re)naskiĝis por kontentigi la identecajn kaj komunikajn bezonojn de la kreiĝanta israela nacio. La lingvaj reformoj de Atatürk helpis trovi novan, pli modernan identecon por la turka nacio, reserĉanta ĝin dum la disfalo de la Otomana imperio. Jacob Grimm kaj Danto strebis doni regulan kaj unuecan lingvon al siaj nacioj dum la kreado de la germana kaj itala naciaj ŝtatoj.

Massimo d’Azeglio diris en la 19a jarcento: “Ni kreis Italion. Nun ni devas krei italojn”. Se Zamenhof resurektus nun, li verŝajne edifus al ni simile: “Mi kreis Esperanton, nun vi devas krei esperantistojn”. Tiukampe ni ĝis nun malsukcesis, kaj la nuna situacio klare montras tion. Danke al la Lingvo Internacia homoj, fiere nomantaj sin “samideanoj”, vige diskutas en sociaj retoj, sed ili uzas Esperanton kiel nuran komunikilon sen iu ajn “interna ideo”, kaj anstataŭ fari demandojn al reprezentantoj de aliaj kulturoj kaj ŝtatoj ili laŭte proklamas opiniojn kaj informojn, ĉerpitajn el sia lingvaj amaskomunikiloj. Do, same kiel antaŭ ducent jaroj, interparolas ne homoj kun homoj, sed francoj kun angloj kaj rusoj kun poloj.

La aŭtoro plurfoje atentigas, ke lingvo estas forta ilo de socia strukturigo kaj ŝtata politiko, kaj ne hazarde plej raciaj kaj foje cinikaj politikistoj foraj de lingvoscienco kaj sentimentaleco donis tioman atenton al lingvopolitiko. Rimarkindas ke inter modernaj ekzemploj de gravaj lingvopolitikaj decidoj kiel la unua estas prezentita lingvoleĝo akceptita en 2014 en Ukrainio kaj seniginta la rusan (kaj aliajn minoritatajn lingvojn) de oficiala statuso. La aŭtoro de la libro, aperinta origine en 2016, rekte diras ke tio ekstreme streĉis rilatojn de Ukrainio kun Ruslando, kaj kontribuis al estiĝo de interŝtata konflikto.

Nun, post ok jaroj, ni jam scias, kiom alta estas la kosto de tiu ĉi provo transformi la pluretnan kaj plurlingvan landon je unuetna kaj unulingva ŝtato kun naciisma ideologio. Do necesas memori, ke ne ĉiuj lingvopolitikaj provoj estas sukcesaj kaj ke tiuj prezentitaj en la libro estas verŝajne eta ondo de la tuta eksperimentaro, same kiel Esperanto estas unu el centoj da fiaskintaj lingvoprojektoj.

Cetere inter miaj konkludoj estis ankaŭ esperigaj. Tiel la rakonto pri klopodoj de la unua prezidanto de Senegalio Léopold Sédar Senghor krei unuecan afrik-francan nacion surbaze de la franca lingvo aŭ almenaŭ konservi la lastan kiel komunikilon ene de Franclingvio, memorigis al mi la sorton de la rusa lingvo en la ekssovetuniaj respublikoj.

Plejparto el ili ne estas tiom pluretnaj kiel afrikaj ŝtatoj, do post la akiro de la

sendependeco en 1991 ili proklamis kiel la ŝtatan lingvon sole la lingvon de la plej granda etno, laŭ kiu estis nomita respektiva lando (taĝikoj en Taĝikio, armenoj en Armenio ktp). Tamen post 32 jaroj de la sendependeco, kvankam tie vivas jam la dua generacio de civitanoj, por kiu patrujo estas tiuj ĉi naciaj ŝtatoj, la uzado de la rusa lingvo daŭras en pluraj kampoj kaj eĉ kreskas.

En lastaj jaroj lokaj aŭtoritatoj donis specialan atenton al instruado de la rusa, subskribinte interŝtatajn interkonsentojn kaj la prezidanto de Kazaĥio eĉ proponis krei por la rusa asocion similan al Franclingvio. Kaj la motivoj de tute malsamaj politikistoj en la landoj, kie ruslingva loĝantaro foje preskaŭ komplete malaperis, estas la samaj, kiuj gvidis la senegalanon Léopold Sédar Senghor – ili komprenas, ke en la prognozebla estonteco ilia plej grava komerca partnero, fonto de novaj teknologioj kaj scioj, estos Ruslando, do la instruado de la rusa estas vojo al progresigo de iliaj nacioj.

Alia optimisma konkludo rilatas al terminologia malriĉeco, ofte prezentata kiel grava baro survoje de Esperanto al la statuso de vaste uzata mondlingvo. Tio sonas konvinke, ja ĉiu provinta uzi Esperanton por verkado de specialaj tekstoj (sciencaj, teknikaj ktp) neeviteble spertis mankon aŭ malperfektecon de la Esperanta terminaro en ĉiu kampo. Sed tiu problemo validas ankaŭ por la naciaj lingvoj, tamen oni plu uzas ilin, kaj nur plej etaj nacioj kapitulacas kaj transiras al instruado en lingvo de pli granda nacio.

Plej gravas ke tiu ĉi problemo estas superebla – necesas nur forta volo kaj skrupula diligenta laboro. Pruvi tiun ĉi konkludon povas mirinda sukceso de la indonezia lingvo, kies gramatiko estis publikigita de Sutan Takdir Alisjahbana antaŭ unu jarcento. Tamen ĝis 1970 la Komisi Istilah (komisiono pri terminologio) kreis 321 mil 710 novajn terminojn. La rezulto estas impresa: la tuta instruado en Indonezio okazas en la indonezia lingvo. Ĉu imitinda ekzemplo por esperantistoj?

Bedaŭrinde, ĝis nun nenio komparebla estis entreprenita en Esperantujo. Iam je terminologia kampo aktivis forstistoj kaj fervojistoj, sed ŝajnas ke tiu agado velkas, kaj eĉ jamaj atingoj apenaŭ uzeblas por vasta publiko, ĉar ili ne estas enretigitaj kaj ekzistas nur kiel paperaj vortaroj, starantaj en profundaĵoj de bibliotekoj. Jen kaj jen aperas kadre de privataj iniciatoj vortaroj pri apartaj fakoj (aviado, konstruado ktp), sed ĉio ĉi okazas ĥaose, kaj la fruktoj de tiu laboro plejparte estas nek konataj, nek konsulteblaj por nefakuloj. Solvi tiun problemon povus unueca gvida institucio kiu kunordigus la terminologian laboron kaj publikigus rete ĝiajn fruktojn, sed evidente por tio en Esperantujo devus aperi nova Zamenhof.

Bela klasikaĵo

Iom pri la libro mem kaj pri ĝia Esperanto-versio. La teksto estas verkita en flua kaj simpla lingvaĵo, facile komprenebla eĉ por nefakulo kiel mi. La aŭtoro sukcesis kombini tiun malpezecon kun science skrupula traktado de la materialo – ĉiun

aserton akompanas abundaj referencoj, post ĉiu ĉapitro sekvas detalaj klarigoj, fine de la libro plurajn paĝojn okupas klasika scienca aparataro. Do temas pri legaĵo alloga, facila, simpla, sed kredinda kaj aŭtoritata – malofta kombino.

Apartan laŭdon kaj dankon la aŭtoro meritas pro tio, ke li sukcesis eviti kliŝojn, tiom oftajn en la amaskomunikiloj kaj eĉ en sciencaj verkoj, rilate siajn heroojn. Ekzemple, parolante pri Lenino, li koncentriĝas je objektiva prezentado de la faktoj – sen tradiciaj frazoj pri “diktatoro” aŭ fantazioj pri ĉiama subpremado de la etnaj minoritatoj kaj iliaj lingvoj en Sovetunio. Same li parolas pri Zamenhof kaj lia kreaĵo klare kaj kun malkaŝa simpatio, kvankam nenie eksplicite vortumita. Cetere la tekston finas foto de la aŭtoro ĉe ŝildo de strato Esperanto, do *sapienti sat*.

La Esperanto-eldonaĵo estas altkvalita kaj sekvas tiurilate la laŭdindan tradicion de la eldonejo Mondial. Mi legis pdf-version, sed la enpaĝigo aspektas bone, mistajpoj tre maloftas, la tiparo estas bela. Apartan dankon meritas la tradukinto Jan P. Sandel, plenuminta grandan kaj malfacilan laboron tiel, ke lia ĉeesto apenaŭ sentblas, kaj la teksto fluas senĝene, kvazaŭ originale verkita en Esperanto. La elekto de la tradukinto estis ege bonŝanca, ĉar li evidente interesiĝas pri lingvoj kaj konas plurajn, do plejparton de la citaĵoj li tradukis el la originaj fontoj kaj en referencoj ofte renkontiĝas liaj komentoj kaj klarigoj, ĉiam informriĉaj kaj utilaj.

Resume, mi forte rekomendas tiun ĉi libron al ĉiuj legantoj interesiĝantaj pri lingvoj ĝenerale, lingvopolitiko kaj lingvoplanado aparte. Ĝi estas verko, kiun oni povas legi de l' komenco ĝis la fino kaj poste reveni al apartaj ĉapitroj laŭ bezono kaj plaĉo, kaj konsulti ĝin okaze de duboj kaj meditoj, farante proprajn konkludojn, eble malsamajn ol tiuj prezentitaj supre.

Stanislav Belov

Orfeo kantas

Rilke, Rainer Maria. *La Sonetoj al Orfeo* / Tradukis el la germana Mark Fettes; Antaŭparolo de Duncan Charters. – Novjorko: Mondial, 2020. – 143 p. – (Serio *Oriente-Okcidento*, №59).

Rainer Maria Rilke (1875–1926) estas ĝenerale konsiderata kiel unu el plej gravaj verkistoj de la germanlingva literaturo. Por alilingvaj legantoj lia famo estas pli limigita, ĉar lia poezia verko, kaj nepre *La Sonetoj al Orfeo*, ofte ŝajnas obskura kaj sintakse duba. La privata lingvouzo ne nur malhelpas la rektan komprenon, sed ankaŭ efike rezistas tradukadon. Tial fojfoje aperas la opinio, ke verko kiel *La Sonetoj al Orfeo* ne estas tradukebla.

En sia saĝa antaŭparolo Duncan Charters citas la atentigon de William Auld, “ke nenio estas netradukebla en Esperanton, tamen ke tio dependas de la spirito de la tradukanto” (p. 7). Feliĉe ni havas tian spiriton inter ni. Mark Fettes sukcese kaptas la etoson de Rilke.

Tio tamen ankaŭ signifas, ke la kompreno ankoraŭ ne estas facila. Rilke mem

asertis (eble tro kokete), ke li mem ne komprenis, kion li skribis. Li diris pri tiuj sonetoj, ke “ili eble estas la plej mistera, por mi mem enigma diktaĵo kiun mi iam eltenis kaj atingis” (en letero al Xaver von Moos). Mark Fettes citas tiun rimarkon en sia tre utila enkonduko. Krome Rilke konstruas la fikcion, ke li “vidis la ĉielon malferma” kaj “ricevis signalon el la kosmo”, kvazaŭ li nur estis ricevilo por tiuj eksterteraj mesaĝoj.

Ne estas mirinde, ke filologoj ofertas abundon da malsamaj interpretadoj de tiu poemciklo, foje esoteraj, foje filozofiaj, foje estetikaj. Sed ankaŭ eblas esprimi la temon pli simple. En la vortoj de Duncan Charters: “kiel trovi feliĉon kaj vivi kun ĝojo en mondo kie ŝajne ĉio pereas”.

La Sonetoj al Orfeo absolute ne taŭgas por rapida legado kaj postulas ripetan legadon. Mark Fettes emfazas: “kiel aliaj grandaj poeziaj verkoj, la Sonetoj ne tuj malkaŝas siajn sekretojn; ili similas al fruktoj kiuj maturiĝas malrapide en la koro de la leganto” (p.13).

Ĉi-tie ne estas la loko por oferti ŝlosilon al la verko. Tial mi ŝatus prezenti relative alireblan soneton el la ciklo, la sesan el la dua parto.

*Roz', vi tronanta, al niaj prauloj
vi estis kaliko kun rando senpena.
Al ni tamen floro jam preter kalkuloj,
la neelĉerpebla objekto plenplena.*

*Riĉule jen portas vi veston sur vesto
ĉe korpo konsista el nura glimlumo;
sed ĉiu petalo samtempas forgesto
kaj malnecesigo de ĉiu kostumo.*

*Jarcentojn vi vokas al ni perarome,
la plej dolĉajn nomojn etere alspiras –,
subite ekŝvebe jen kvazaŭ famkone.*

*Malgraŭe, vi restas senscie baptita...
Kaj al vi sindone memoro transiras,
kun ĉio de l' horoj kvestade kaptita.*

La atenta leganto trovas la sonetojn, kie rozoj aperas (I,5 kaj II,21) kaj iom post iom povas kompreni, kion signifas rozoj por Orfeo (kaj Rilke).

Mi ĝojas, ke nun eblas esplori tiun kolekton ankaŭ en Esperanto.

Wolfgang Kirschstein



Albumo kun agrabla “hejmeca” sono, sed iom simplaj tekstoj

ĴeLe. Tra la sonĝoj: Bitalbumo. – Dieter Wilke: Vinilkosmo, 2023.

La recenzata albumo estis produktita jam en la bona malnova jaro 2010, sed eniris la merkaton nur antaŭnelonge per la zorgoj de Vinilkosmo. Temas pri iusence “familia” projekto: malantaŭ ĝi staras du virinoj – ili estas Lena (la patrino) kaj Ĵenja (la filino); la muzikistinojn ĉiel subtenis samtempa edzo kaj patro Dieter Wilke. La nomo de la muzikanta kaj kantanta duopo *ĴeLe* estas kunmetaĵo de la unuaj silaboj de la virinaj kares-nomoj.

La albumo enhavas 15 kantojn. La plimulto el ili estis verkita kaj komponita de Jelena (Lena) Wilke, sed sonas ankaŭ kelkaj kantoj de aliaj aŭtoroj (inter ili – tre interesa interpreto de la kanto de V. Soroka *Karteta dometo*, konata al multaj esperantistoj de eksSovetio); krome aŭdeblas unu kanto de la germana muzikgrupo *Karusell* (kun la E-adaptita teksto) kaj unu popola ukraina kanto (*Du kverkoj*, tradukita de Jelena). La kantojn akompanas bela kaj harmonia muziko, ĉefe plenumata per piano kaj gitaro, sed kun ofta partopreno de violono kaj okazaj kelkaj pliaj sonoj. Pro tio, ke la albumon preparis du virinoj, estas nature, ke multfoje sonas la du-voĉa kantado.

Muzike ĉiuj pecoj estas sufiĉe diversstilaj, tamen la ĝeneralan tonon de la albumo mi kuraĝus difini kiel “modernan bardan stilon”. Vere, ĉiujn kantojn karakterizas sufiĉe simplaj kaj facile kanteblaj melodioj, al kiuj tamen neniel mankas sincero, bel-eco kaj eĉ altrudiĝemo al la memoro. La tekstoj estas plejparte simplaj kaj tuŝas la plej kutimajn temojn: la amon, la amikecon kaj la buntecon de la foje malfacila vivo (sed aperas ankaŭ kelkaj kantoj kun Esperanta fono). Laŭ mi, tiuj tuj rimarkeblaj ecoj bone kongruas ĝuste kun la plej bonaj specimenoj de la eksSovetia barda stilo. Sed mi tuj trankviligu tiujn, kiujn la mencio pri “barda kant-arto” povus timigi: neniel temas pri la simpla kelk-akorda gitara akompano; male – ĉiuj kantoj estas diverse kaj plaĉe aranĝitaj (eĉ se uzante ne tro buntajn muzikajn kolorojn) kaj perfekte plenumitaj. Rezultas do tre agrabla por la orelo “nelaŭta” muzik-albumo, kies sincera prezento eĉ donas la impreson pri la “ĉambra” kaj “viva” plenumado.



Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Rusa Novelaro 2: Vera regalo

Mi riskus aserti, ke plej multaj legemaj brazilanoj konas el la vasta rusa literaturo iom de Dostojevskij, iom de Tolstoj kaj iom de Ĉeĥov kaj Solĥenin. La elitaj, plej kleraj, ankaŭ iom de Gogol kaj Gorĵkij. Pli modernaj aŭtoroj, ekzemple el la 20a jarcento, estas al ni preskaŭ tute nekonataj.

Tial la serio *Rusa Novelaro 2*, publikigita pasintjare en *La Ondo de Esperanto*, unue poparte, en sinsekvaj numeroj de la revuo, aperonta poste en volumo kun la tuta kolekto, estas vera regalo. Al mi efikis multe pli impresi legi sinsekve la verkojn de la kvar unuaj aŭtoroj, kion mi sukcesis fari dum nelonga tempo. La sinsekvo transdonis al mi ian malfacile klarigeblan sed klaran bildon de la rusa animo, de la rusa pensmaniero.

La rakontaj scenoj aperas antaŭ la okuloj kvazaŭ filme, kaj fakte kelkaj el ili ja transformiĝis en kinajn filmojn. Jen kamparaj priskriboj, kie la rusa naturo bildiĝas vikle kaj videble; jen urbaj scenoj kaj homfiguroj, kiuj verŝajne fidele reprezentas la rusan socion. Kelkaj rakontoj aspektas kiel disaj, ŝvebantaj epizodoj de la popola vivo, aliaj montras sociajn konfliktojn kaj homan perpleksecon. Luj tekstoj sonas fantazie, aliaj krude realisme.

Por 2022 estis elektitaj kvar aŭtoroj: Ivan Bunin, Aleksandr Kuprin, Maksim Gorĵkij kaj Fjodor Sologub. De ĉiu aŭtoro esperantigis po kelkaj noveloj A. Korĵenkov, V. Jurganov kaj L. Novikova. Ni tuj notu, ke la tradukoj estas bonegaj. Kompreneble, mi ne scipovas la rusan lingvon, kaj mi taksas tion nur laŭ la fluaĵ, esprimoriĉaj Esperantaj tekstoj.

Estas granda plezuro legi la tuton. Kaj finleginte, oni apenaŭ povas eviti la demandon: “Kiu estas la plej brila novelo en la kolekto?” Estus interese, se la abonantoj de *La Ondo* respondus al ĝi enquete.

Laŭ mia prefero, mi elektas Maksim Gorĵkij: “Foje en aŭtuno” kaj “La naskiĝo de homo” ŝajnas al mi brilaj rakontoj. Estas neeble ne senti kortuŝon dum la legado de ili. Jen eta provoko al tiuj, kiuj ankoraŭ ne legis la *Rusan Novelaron 2*.

Estus belege, se el aliaj landoj oni povus ricevi similajn kolektojn!

Paulo Sérgio Viana

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” bonvenigas humoristojn, karikaturistojn, enigmoverkantojn kaj aliajn “leĝerĝenrajn” aŭtorojn por kunlaboro en nia relanĉita rubriko “Mozaiko”.

La feria sezono!

Geedzoj Smith bonege pasigis la someran ferion – ŝi en Kalifornio kaj li en Tajlando.

Klara aranĝas ĉion antaŭ ol foriri al ferioj, murmurante: “La infanojn ni sendos al mia patrino, la katon kaj hundon prizorgos niaj najbaroj, la papagon ni lasos al mia amikino...” Ŝia edzo reagis rezoneme: “Se hejme estos tiom trankvile, por kio ni foriru?”

Turisto kun krio forkuras de kanibalo:

- Lasu min, mi devas nutri miajn edzinon kaj infanojn!
- Ĉu pro tio miaj infanoj devas morti pro malsato?

Maria demandas sian edzon:

- Kiel vi dezirus pasigi ferion?
- Same kiel antaŭ dudek jaroj.
- Sed ni geedziĝis antaŭ dek naŭ jaroj!
- Ĝuste pri tio mi parolas.

Ĉiĉerono demandas turiston, venintan matene al LiĤtenŝtejno.

- Kiel vi planas pasigi la ferion ĉi tie?
- Mi deziras lui biciklon kaj ĉirkaŭveturi la tutan landon!
- Bonega ideo! Kaj kion vi faros posttagmeze?

Oni demandas turiston, revenintan aŭtune post unumonata vojaĝo en Vjetnamio.

- Ĉu la vetero estis bona? Oni diras, ke nun tie estas pluvsezono.
- Mi estis bonŝanca, pluvis nur dufoje – unuafoje dum dek tagoj kaj la duan – dum dudek.

Viro venis kun bebo al pediatro:

- Edzino ferias kaj lasis min sola kun filo. Mi faras ĉion kion ŝi diris: promenadon, masaĝon, ludojn ktp, tamen li tre maldikiĝis.
- Hm, per kio vi nutras lin?
- Damne, mi sentis ke mi ion forgesis!

Sugesto el gvidlibro pri Oceanio: “Ne hastu ĝoji se nudaj junulinoj en sovaĝa insulo bonvenigas vin kaj superŝutas per floroj. Eble temas pri spicaĵoj...”

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Kiel pasas temp', aŭ: Epokfara malkovro

En la historio okazas tiel, ke unu epoko postsekvas la alian. (Dima Ŝevĉenko: *Artefarita intelekto, neŭroretoj kaj Esperanto // Esperanto*, 2023, №5, p. 99)

Ars longa, aŭ: La homoj el domo en Romo

En la delegacio artoprenis kelkaj kunlaborantoj ĉe la Centra Oficejo de IKUE en Romo... (*Espero Katolika*, 1976, №8, esperokatolika.org/ek19761980/ek1976_08.htm9)

Ĉina rakonto pri konto

Laŭlum <...> faras grandajn kontrubojn al la ĉina Esperanto-movado kaj internaciaj interŝanĝoj. (esperanto.china.org.cn/2023-06/10/content_86956492.htm; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Movado olda kiel la mondo mem

Dimanĉe ĉirkaŭrigardan ĝisdatigan prelegon pri evoluo de Esperanto-movado en la mondo ekde ĝia komenco ĝis nun faris Sigita Barniškienė... (*Ĵurnalista seminario en Litovio: tradicia tempo, nova loko*; sezonoj.ru/2023/06/litovio-60/)

Jardeko perdita

Hodiaŭ esperanto iĝas 126-jara. (esperantio.net/index.php?id=4767, stato 2 jun 2023)

Karina ne plu senhejma

... estis organizitaj konversaciaj rondoj kun Karina Oliveira, kies gastigadon poste transprenis TEJO. (*Aktivuloj klopodas savi la kursojn de Duolingo*, liberafolio. org/2023/06/13/aktivuloj-klopodas-savi-la-kursojn-de-duolingo)

Sed akuzativon ne necesas

Nun tiu epoko praktike ĉesis kaj necesas andragogian profundigon. (*Reveno de la Danuba Esperanto-Rendevuo*; esperantio.net/index.php?id=4765)

Stari kuŝe, vortumi fuŝe

Temas pri betona ortangula paralelepipedego (vorto estetike kongrua) kiu staros kuŝe en la valo, inter la dorso de granda komerca centro kaj la fervojo Ĉaŭdefono-Loklo. (*CDELI situos teretaĝe en planita grandioza arkivejo*, esperantio.net/index.php?id=4748)

Aaro da eraro

Aaro Hellaakoski (1893-1952)... Foto de la poeto el la 2030aj jaroj. (*Beletra Almanako*, 2022, №45, p. 74)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 148-paĝa junia *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>